

IL POPOLO CINIO

中國報通

10 1986





Montvilaço

Enhavo

Soseoj en nordokcidenta Ĉinio	2
Suĝoŭ, malpez-industria centro el 2500-jara urbo	10
La "Plano Ŝinghŭo" praktikata en Ĉinio	5
Reviviĝis ŝiaj rekunigitaj fingroj	8
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (V)	65
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (21): Alpismo en la monta regno	49
Konkurso inter junaj piedpilkistoj	17
Iri al lumo de tie ĉi	20
Ili revenas en la socion	25
Ĝojo en korto de kamparana familio	28
EL REALA VIVO DE ĈINIO: Grimpado sur tranĉil-eskalo	56
En la hejmloko de la reĝo de floroj	30
La arto de lanterno (Bildoserio)	33
ĈINA LITERATURO:	
"Libro de Poezio", la unua kolekto de poemoj de Ĉinio	39
Birda kanto; Cidonio	41
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Tradiciaj festoj de ĉinaj nacimalplimulto	36
Brila perspektivo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Latin-Ameriko	44
Amika renkontiĝo de ĉinaj kaj rumanaj junuloj (Bildoserio)	60
KURANTAĴ AFEROJ	24, 32
Renkontiĝo de esperantistoj en Lepsiko	62
POR KOMENCANTOJ: Amikeco	67
ESP-NOVAĴOJ	46
INTER NI: Kelkaj proponoj	66
AMUZO	43

SUR LA KOVRILO: Konduktorinoj en novaj vestoj	Foto de SEN ĈEN
INTERNE DE LA KOVRILO: Montvilaĝo	Foto de GE ŬEJŬEJ
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Ebura drakŝipo	Foto de HU ĈUJ
SUR LA DORSKOVRILO: Antaŭenruliĝado (Ĉinstila pentraĵo)	de JANG GŬANGHŬA

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalia	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

En la sallaga regiono de la baseno Ĉajdam de Ĉinghaj estas ŝoseo 503 kilometrojn longa pavimita per salkrusto formita el sekigita salakvo. Se oni pavimus tie la vojon per cemento aŭ asfalto, la vojo estus facile mordata de salo, dum la ŝoseo el salkrusto estas fortika kiel fero kaj glata kiel spegulo, sur kiu povas kuri eĉ pezaj ŝarĝaŭtoj.

La grandnombraj ŝoseaj lignoj kaj ŝtonaj pontoj kuŝantaj super Jangzi-rivero, la Flava Rivero kaj aliaj riveroj estas anstataŭigitaj per pontoj ferbetonaj duoblearkaj kaj T-trusaj.

Kun la ekfunkcio de la ŝoseo vekigis la primitiva arbaro longe dorminta. Pli ol 140 specoj da minajoj, kiaj oro, petrolo kaj karbo, ĉ. mil specoj da farmaciaj drogoj kiaj gastrodia tubero, liciaj fruktoj, ĉ. cent specoj da lokaj produktaĵoj kiaj sterkulio, lako kaj felo estas ekspluatataj. Dekmiloj da fabrikoj kaj komercaĵaj prilaborejoj unu post alia stariĝis en diversaj lokoj de la nordokcidenta parto de Ĉinio. La popola vivo iom post iom pliboniĝis kun prosperiĝo de ekonomio.

Kun disvolviĝo de ekonomia konstruado en la Nordokcidento, la tieaj ŝtataj kaj kolektivaj entreprenoj jam havas pli ol 300 000 aŭtomobilojn, kiuj tamen ne povas kontentigi la bezonon.

Ekde 1982 sub la aŭspicioj de la ŝtato iuj kamparanoj aĉetis aŭtojn kaj sin okupiĝis pri ŝosea transporto, dum la ŝtato ellaboris koncernan politikon por protekti interesojn de la kam-

paranoj. Trafikaj departementoj de diversaj lokoj helpas la individuajn kamparanojn en elektado de vojlinioj, servas al ili per tekniko kaj informoj en la staciaj aferoj, protektado kaj oleprovizo de aŭtoj, manĝaĵoj kaj noktado k.a. La ŝtata kaj kolektiva trafikaj departementoj ankaŭ fervore trejnas stiristojn kaj konduktorojn por ili.

La ŝtato, kolektivoj kaj individuoj sin okupas pri trafiko, kio ne nur utilas al la interŝanĝo de la varoj, sed ankaŭ plibonigas la servadon en pasaĝera transportado. "Aŭtomobilo por popolo", "Aŭtomobilo al foiroj", "Aŭtomobilo turisma", "Aŭtomobilo al teatro" de privatuloj pli kaj pli multiĝis kaj estas ŝatataj de la kamparanoj. La aŭtomobiloj multe oportunigas la kamparanojn ne nur per halto ĉe mansvingo, senpaga livero de etmanĝaĵoj al pasaĝeroj, sed ankaŭ portas la pasaĝerojn al la celo en ajna tempo. Statistiko montras, ke tie la privataj aŭtoj de kamparanoj jam superis 20 000.

La 11 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de la okcidenta parto de Ĉinio estas strategie gravaj lokoj en la ĉina ekonomia ekspluato en la 20-a kaj la sekvanta jarcentoj. Konstruado de ŝoseoj estas nia urĝa tasko. Nuntempe la tieaj popolanoj plirapidigis la ŝosean konstruadon. La 3 konstruataj unuaklasaj ŝoseoj 24 metrojn largaj longas pli ol 70 kilometrojn en la tuto. La diversitaj luksaj aŭtomobiloj pli kaj pli multiĝas. Fakuloj antaŭdiris, ke tio montras la disvolviĝon de la tiea ŝosea konstruado.



La Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo post rekonstruado

La “Plano Ŝinghŭo” praktikata en Ĉinio

La Nacia Scienc-teknika Komisiono de Ĉinio nun organizas kaj praktikas la “Planon Ŝinghŭo” enkonduki modernajn sciencojn kaj teknikojn en la vilaĝojn kaj urbatajn entreprenojn.

En la lastaj jaroj, dank’ al la reformo de agrikultura ekonomia strukturo, rapide disvolviĝis la agrikulturaj produktofortoj, kaj en la vilaĝoj aperis granda kvanto da superflua laborfortoj. Utiligante ekstreme abundajn riĉfontojn en la kamparo, ili montris sian talenton en prilaborado kaj sinteza utiligo de produktaĵoj de agrikulturo, forstumado, brutobredado, flankproduktado kaj fiŝkaptado kaj ekfunkciigis grandan nombron da urbataj entreprenoj, forlasinte la kampojn sed ne la hejmlokon kaj enirinte fabrikon en la kamparo sed ne urbon. Tiaj entreprenoj estas malgrandaj, fakaj kaj flekseblaj en produktado, tial estas facile apliki en ili avangardajn teknikojn, rapidigi varigon de sciencaj kaj teknikaj fruktoj kaj konforme al la postuloj de la merkato produkti malgrandajn varojn urĝe bezonatajn kaj speco-variajn. Ankaŭ la urbataj entreprenoj alfrontas multajn konkretajn problemojn urĝe solvendajn, ekz. tiujn pri siaj plano kaj dispozicio, specoj de produktaĵoj, merkataj informoj, alta procentaĵo de materiala kaj energia konsumado, kvalita nestabileco, nesufiĉeco de teknikaj ekipaĵoj kaj fortoj, polucio-prevento, scienca administrado kaj aliaj. La radikalaj kaŭzoj kuŝas en tio, ke mankas al ili teknikoj kaj talentuloj. Se oni ne solvas siaflanke tiujn problemojn, la urbataj entreprenoj disvolviĝos malfacile, precipe en la senĉesa disvolviĝo de grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj. la urbataj entreprenoj eble perdos konkuranton kapablon kaj ne povos ekzisti plu. Estas urĝe bezonate, ke la sciencoj kaj teknikoj sisteme helpu la urbatajn entreprenojn solvi la problemojn kaj faru kontribuon al ilia daŭra disvolviĝo. La “Plano Ŝinghŭo” postulas, ke la sciencaj kaj teknikaj departementoj, scienc-esploraj institutoj

kaj altlernejoj faru kompletan kunlaboron kun la urbataj entreprenoj, subtenu ilian disvolviĝon en teknikaj politikoj, teknikaj informoj, avangardaj scienca administrado kaj teknologio kaj ekipaĵo, organizu la nunajn sciencajn kaj teknikajn talentulojn kaj trejnu novajn fakajn talentulojn por antaŭenpuŝi la reformon de agrikultura strukturo kaj prosperigi la lokan ekonomion.

En la periodo de la Sepa Kvinjara Plano de Ĉinio la “Plano Ŝinghŭo” havas jenajn tri konkretajn celojn:

Unue, ĉiujare kulturi por urbataj entreprenoj 200 000 kamparajn intelektajn gejunulojn kaj baz-unuajn kadrojn, por ke ili posedu en mallonga tempo unu aŭ du teknikojn konformajn al la bezono de ilia loko.


Due, ekspluati cent specojn de kompletaj teknikaj ekipaĵoj konformaj al la bezono de la kamparo kaj organizi grandskalan produktadon de tiuj ekipaĵoj por provizi la urbatajn entreprenojn.

Trie, helpi diversajn lokojn starigi 500 teknike modelajn urbatajn entreprenojn kaj provizi ilin per kompleta teknologio, administraj regularaj normoj, projektado de produktaĵoj, kvalito-garantiaj rimedoj, prilaboraj metodoj kaj aliaj.

De 1985, kiam la plano estis ekpraktikata, oni aranĝis 40 objektojn en pli ol 20 provincoj ĉefe por pliiĝi akvoproduktaĵan kvanton, ekspluati bredan teknikon, sinteze ekspluati kaj utiligi montregionajn produktaĵojn, prilabori kaj sinteze utiligi grason, kulturi fruktarojn, konservi kaj transporti freŝajn fruktojn, ekspluati kaj utiligi multekostajn ĉin-medicinajn drogojn, ekonomiajn plantojn ktp. En 1986 kaj 1987 ankaŭ en tiuj produktaĵaj kampoj estos praktikata la plano por disvastigi sciencojn kaj teknikojn. La plano ludos grandan rolon en plifortigo de teknika reformo de agrikulturo, provizo de urbataj



Sciencisto donas lecionon pri faka administrado al funkciuloj de urbaj entreprenoj.



Filmado de la programero "Televida Kurso pri Ĉiufanka Kvalito-kontrolo de Urbaj Entreprenoj"

entreprenoj per sciencoj kaj teknikoj kaj ŝanĝo de la fizionomio de la malriĉaj kaj postĝintaj regionoj per sciencoj kaj teknikoj.

Nun ĉiuj provincoj kaj municipoj aktive plenumas la planon. Hebej-provinco antaŭ ĉio aranĝis objektojn de la plano en urbetoj kaj subdistriktoj de la montregionoj Tajhang, Janŝan kaj Hengŝan kaj en Baŝang-altebenaĵo kaj marborda

regiono kun kompare malbonaj ekonomiaj kondiĉoj kaj abundaj krudmaterialoj por helpi ilin kiel eble plej rapide forskui malriĉecon. La provinco jam sendis pli ol 3 000 sciencistojn kaj teknikistojn al tiuj regionoj por disvastigi sciencojn kaj teknikojn. La sciencistoj kaj teknikistoj de la Ŝenŝji-a Akademio de Sciencoj eniris profunden en Ŝanglŭo-montregiono kun abundaj naturaj rezer-



Leciono

voj por plenumi la planon. La servo-grupo de Ŝanŝji-provinco el mil sciencistoj kaj teknikistoj iris al la kamparo por disvastigi sciencajn kaj teknikajn sciojn. Ili metis gravitan punkton de sia laboro sur bredadon, kulturadon, entreprenadon de malgrandaj minejoj, konstru-materialaj fabrikoj, ŝpinteksejoj kaj aliaj. Siĉŭan-provinco praktikas la planon en Dabaŝan-montregiono kaj post nur duonjaro akiris sukceson. Aktinidioj (*Actinidia chinensis*), giromitroj, asparagoj, blankaj orelfungoj kaj aliaj estas sinteze utiligataj. La unuaj 12 objektoj de Ŝanhajo estas rapida bredado de dolĉakvaj fiŝoj kaj flav-plumaj viandaj kokoj per biotekniko, ekspluatado de insulaj naturaj riĉfontoj kaj starigo de oranĝo-produktaj bazlokoj k.a. Ĝia konsildonanta grupo iris al la kamparo por doni al kamparanoj teknikan demonstradon kaj konsultiĝon. Utiligante la naturajn riĉfontojn, Ĝeĝjang-provinco popularigas sciencojn kaj teknikojn por prosperigi ekonomion de la urbetaj entreprenoj en kulturado, bredado kaj disvolvado, prilaborado kaj konservado de famaj indiĝenaj produktaĵoj.

Multaj institutoj jam ekagis por plenumi la taskon de la "Plano Ŝinghŭo" elkulturi milionon da vilaĝaj sciencaj kaj teknikaj talentuloj dum la Sepa Kvinjara Plano. Pekino starigis oficejon de televida kurso pri ĉiuflanka kvalito-administrado

de urbetaj entreprenoj. Nun ĝi jam elkulturis grandan nombron da lokaj asistantoj por la tuta lando, kiuj helpas oficistojn kaj laboristojn de urbetaj entreprenoj en ilia faka lernado. Popularigo de la scioj pri ĉiuflanka kvalito-administrado de entreprenoj en la kamparo per aŭdo-vida eduka programo estas vojo nepre irota por prosperigi la urbetajn entreprenojn kaj ankaŭ grava urĝa laboro. Nun la Koresponda Teknika Universitato por la ĉina kamparo komencis akcepti novajn lernantojn kaj kulturos por urbetaj entreprenoj talentulojn posedantajn praktikajn teknikojn. Ĝi havas fakojn de bredado, kulturado, prilaborado, urbeta entrepreno kaj aliaj. Al la demandoj de ĝiaj lernantoj faros respondon Radio Pekino per sia Programero pri Sciencoj. La Scienc-Populariga Eldonejo, la Scienc-teknika Eldonejo de Ĝeĝjang-provinco kaj aliaj eldonos libron por popularigi en la kamparo sciencajn kaj teknikajn sciojn.

La "Plano Ŝinghŭo" estas afero kun longtempa kaj reala signifo. Servigi la sciencojn kaj teknikojn al la kampara ekonomio nun estas grava tasko por la ĉinaj sciencistaj kaj teknikistaj rondoj. En sia praktiko la plano ricevas striktan kunlaboron de ekonomikaj, edukaj, agrikulturaj, komercaj, malpez-industriaj departementoj de Ĉinio.



DA ŬEJ:

Reviviĝis ŝiaj rekunigitaj fingroj

Ŭang Futaŭ povas iom uzi siajn kuracitajn fingrojn.

Lastatempe la pola gazetaro alportis la informon pri la senprecedenca kirurgia operacio de ĉiuj dek fingroj de ĉina malsanulino. Bonvolu skribi artikolon sur la paĝoj de EPC pri tiu ĉi operacio kaj pri ŝia sanstato.

Stanislaw Smigielski

(Pollando)

En la 27-a de januaro 1986 la dek fingroj de la 20-jara persistino Ŭang Futaŭ de Huŝjan-gubernio, Ŝenŝji-provinco, estis derompitaj de papergilotino. Post kvin horoj ŝin operaciis kirurgoj de la ostologia sekcio de Ŝjiĝing-hospitalo sub la Kvara Armea Medicina Universitato de Ŝjian. Reviviĝis ŝiaj replantitaj fingroj! La inform-serĉa sistemo de koncerna medicina organizo de Ŝanhajo konektiĝis kun tiu de la usona kompanio Loksid kaj konstatis la senekzemplan sukceson replanti dek fingrojn en la mondo.

Post tri monatoj mi iris al Ŝjian kaj vidis Ŭang Futaŭ en malsanula ĉambro de Ŝjiĝing-hospitalo. Ŝi sinĝene ridetis al mi kaj sur ŝia vizaĝo videblis nenia tristo. Mi rigardis ŝiajn manojn kaj vidis longajn cikatrojĝn tra la dek fingroradikoj. Bone resaniĝis la vundoj, roziĝis kaj karnoplenis la fingroj, kiuj jam povis parte fleksiĝi kaj reakiris certan forton. Ŝi facile levis plastan keston kun vestoj, ke mi rigardu. Estis la tagmanĝo de la malsanuloj. Mi fotis ŝin manĝanta per bastonetoj.

Replanti detranĉitajn fingrojn estas malfacilega mikrokirurgia operacio, por kiu oni devas fari enostan fikson, refunkciigi detranĉitajn etendajn tendenojn, per mikroskopo distingi kaj signi angiojn kaj nervojn ĉiu kun diametro de nur 0.4-0.7 mm kaj poste senerare anastomozi ilin unu post alia per nilona fadeno multe malpli dika ol haro, kio postulas subtilan arton. En la


hospitalo mi informiĝis, ke prof. Lu Jupu, estro de la ostologia sekcio, alte taksas junajn kirurgojn pro iliaj bona vidkapablo, forta korpo kaj rapidema laboro kaj senrezerve instruas al ili la arton de replantado. Sub lia gvido la junaj kirurgoj multfoje sin ekzercis en replanta operacio de kobajaj vostoĝ. La profesoro postulis, ke la replantitaj vostoĝ aspektu bele kaj la interligitaj angioj funkciu bone. Post tiu rigora trejnado ili replantis 232 detranĉitajn fingrojn kaj iom post iom levis la vivipovecon de 60% al 88.8%. La replantadon de la detranĉitaj fingroj de Ŭang Futaŭ plenumis ok kirurgoj kun meza aĝo de apenaŭ 30 jaroj. Ajna malgranda eraro farita de unu el ili povus malsukcesigi la tutan operacion!

Ŭang Futaŭ grave vundiĝis, ke ŝiaj fingroj rompiĝis tuj ĉe la metakarpoj kaj i.a. premvundiĝis la dikfingroj. Revivigi ambaŭ dikfingrojn estas ŝlosila problemo


por la operacio. La operacioj al ŝiaj manoj samtempe iris sur dekstra kaj maldekstra stabloj, sub la gvido de spertaj ĉefkirurgoj. Junaj kirurgoj zorgeme lavis al ŝi la vundojn, fiksas la ostojn, anastomozis la angiojn, kunkudris la nervojn kaj kunligis la tendenojn. Por ne difekti bonajn artikojn dum la fiksado de la ostoj, la kirurgoj kruciĝe fiksas la ostojn evitante la bonajn artikojn, anstataŭ la kutiman serian interligon de bonaj kaj malbonaj artikoj per ŝtalpinglo. La juna kirurgo Ge Ĝing bone rekunigis la dikfingrojn en 11 horoj. Post tio kirurgoj Ĉu Ŝjaŭĉaŭ kaj Ŭang Ĝen sukcesis rekunigi la etfingrojn, kiuj estis plej longe izolitaj disde la manoj kaj la plej malfacilaj por la operacio. En la 27-hora operacio la kirurgoj anastomozis 42 angiojn, 20 nervojn kaj 20 tendenojn, kio metis bonan bazon por la postoperacia refunkciigo de la fingroj de la malsanulino.

Replantado ne estas sinonimo de revivigo. Anstataŭ tuj porti Ŭang Futaŭ al la malsanula ĉambro, la kirurgoj observis ŝin kvar tagnoktojn en la operaciejo. Dume ili rimarkis la cirkulan perturbon de ŝia maldekstra longa fingro, ĝustatempe ĝin esploris, forigis la embolon, transplantis pieddorsan vejnon

Ŭang Futaŭ sin ekzercas por reakiri la funkcion de la rekunigitaj fingroj sub la helpo de kuracistoj.



Ŭang Futaŭ povas prizorgi sin mem.



Antaŭ kaj post la operacio

en tiun fingron kaj per tio evitis al ĝi nekrozon.

Ŭang Futaŭ ricevis specialan flegadon. La flegistinoj traktis ŝin kiel sian fratinton. La kirurgoj faris observan noton ĉiuduhore, konsilis ion al ŝi kaj trankviligis ŝin por stabiligi ŝian animstaton, ĉar ili komprenis, ke anima malstabiliĝo povus vanigi operacion.

Post dekelkaj tagoj oni demetis de ŝi la gipsobandaĝojn kaj malkudris la suturerojn. Kiam ŝi unuafoje sukcese prenis sekan pilon per replantitaj fingroj, lar-
moj ruliĝis el ŝiaj okuloj. Ŝi diris al mi, ke ŝi komencis sin ekzerci por refunkciigi la rekunigitajn fingrojn, helpate de prof. Lu Jupu kaj aliaj kirurgoj. Unue oni banis ŝiajn manojn en varma

akvo kaj poste ilin ekzercis per movoj kaj faris al ŝi masaĝon kaj aŭtomatan movadon per risortaj splintoj. Tia ekzercado ripetigis tri-kvar fojojn ĉiutage.

Dank' al la zorgema kuracado kaj flegado, ŝiaj manoj iom post iom reakiris la funkcion. Nun ŝi povas senti tuŝon kaj doloron ĉe la manoj kaj kombi al si la harojn, lavi la vizaĝon, surmeti veston, alkudri butonon, triki lanveston, uzi manĝbastonetojn kaj skribi leteron. Kompreneble ŝiaj fingroj ankoraŭ ne povas bone fleksiĝi, tamen elastiĝos post kiam la hospitalo faros al ŝi la operacion por malstreĉi la tendenojn. Kun plena fido ŝi diris al mi, ke post la elhospitaliĝo ŝi povos mem prizorgi sin kaj labori kiel antaŭe. Ŝi estas obstina knabino, kiu amas la vivon.

Suĝoŭ, malpez-industria centro el 2500-jara urbo

Teksto de CAŬ BAJLONG

Fotoj de JAN ĜIN

Suĝoŭ estas fama antikva kultura urbo de Ĉinio, kiu aĝas jam 2 500 jarojn. De antikve cirkulas la diro, ke “la plej bela sur la ĉielo estas paradizo kaj en la homa mondo — Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ”. La urbo sidas en la sudo de la delto de Jangzi-rivero, en la sudorienta parto de la provinco Ĝjangsu. La urbo najba-

ras oriente al Ŝanhajo, la plej granda havenurbo de Ĉinio, kaj sude al la provinco Ĝeĝjang. Sudokcidente de la urbo estas la lago Tajhu, kaj tra la urbo trafluas la Granda Kanalo. Oriente de la urbo sterniĝas vasta ebenaĵo. La modera klimato kaj fekundaj kampoj faras la lokon riĉa kaj pitoreska.

BONE KONSERVITA ANTIKVA KULTURO DE LA URBO

Malgraŭ plurfoja rekonstruado dum longa historio, la urbo kaj ĝiaj stratoj ankoraŭ restas ĉe siaj originaj lokoj, kio formis ĝian apartan fizionomion. En la urbo estas bonordaj stratoj kvietaj kaj mallarĝaj, riveretoj lirlantaj apud loĝdomoj, admirindaj

En nova loĝkvartalo



klasikaj ĝardenoj kaj ordinaraj loĝdomoj tegolitaj kaj kalkitaj. Nun en la Konfucea Templo de la urbo konserviĝas ŝtona steleo, sur kiu gravuriĝas mapo de la urbo Pingĝjang (la nuna Suĝoŭ). La steleo 2.84 metrojn alta kaj 1.4 metrojn larĝa estis starigita en 1229 p.K. Sur la mapo estas montoj, riveroj, lagoj, urbomuroj, gubernatoraj oficejoj, stratoj, temploj, pagodoj, pontoj, ĝardenoj, antikvaj restaĵoj, butikoj, lernejoj, tenejoj, loĝdomoj, oficejoj por kortega muzika aranĝo, pavilonoj, arkadoj kaj aliaj konstruaĵoj. La stratoj estas bonorde aranĝitaj kiel ŝaktabulo kaj konformaj al la nuna dispozicio. Tio estas malofte vidata en aliaj antikvaj urboj de Ĉinio.



Loĝdomoj ĉe rivereto

La nunaj ok urbopordegoj de Suĝoŭ ankoraŭ portas la nomojn donitajn de la estro Helju de U-regno en 514 a.K. Helju (?-496 a.K.) estis eminenta kaj ambicia regnestro en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.). Li venkis la potencon okcidentan najbaran regnon Ĉu (la nunaj provinco Hubej, Hunan, Ŝenŝji, Anhuj, Henan kaj Ŝandong) kaj sudorientajn apudmarajn tribojn, per kio li metis bazon por sia filo Fuĉaj (?-473 a.K.) en hegemonio super centra Ĉinio. Suĝoŭ estis la ĉefurbo de U-regno kaj havis perimetron de 23 kilometroj.



Desegnistinoj de la Ventumila Fabriko de Suĝoŭ

Nun oni povas vidi Panmen, unu el la ok pordegoj. La pordego estis rekonstruita sur la origina loko en la 13-a jarcento. Ĝi estis grava strategia konstruaĵo apud rivero. Panmen konsistas el du pordoj, unu sur akvo kaj la alia sur tero. La akva pordo tralasis ŝipojn kaj la surtera militistojn kaj kavalerion. Ĉiu el la du pordoj havas eksteran kaj internan pordojn malfacile konkereblajn. Iuj eĉ kom-

paras la pordon kun la Granda Muro.

Suĝoŭ ĝuas renomon ankaŭ pro siaj klasikaj ĝardenoj. Nun en la urbo estas pli ol 60 ĝardenoj, inter kiuj la plej famaj estas Canglangting konstruita en la

11-a jarcento, Ŝizilin en la 14-a jarcento kaj Ĝuoĝengjŭan kaj Liŭjŭan en la 16-a jarcento. Ili reprezentas la majstraĵojn de ĝardena arkitekturo en diversaj etapoj. (bv. legi "Ĝardenan Urbon Suĝoŭ" en n-ro 9, 1985)

URBO DE TEKSTILA KAJ MALPEZA INDUSTRIO

Suĝoŭ estas ne nur turisma pitoreskejo, sed ankaŭ unu el la gravaj tekstilaj bazoj de Ĉinio. Suĝoŭ produktas grandkvantan silkon kaj famiĝis jam antaŭ pli ol 400 jaroj. Antikvaj libroj registris, ke tiam "en la nordorienta duono de la urbo teksas dek-mil familioj", "matoj por kokonoj amasiĝas kiel montoj kaj susurado de bobeniloj aŭdiĝas el ĉiu domo". Tiam la regiono inkluzive Suĝoŭ ĉiujare omaĝis al la kortego per miliono da ruloj da silkaĵoj. En la 13-a jarcento Suĝoŭ jam estis unu el la centroj de silkaĵoj de Ĉinio. Ĉiujare korteganoj de Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.) venis al Suĝoŭ por aĉeti silkaĵojn por la imperiestra familio. Suĝoŭ produktas multspecajn silkaĵojn delikatajn kaj brilkolorajn kun belegaj desegnoj. La produktokvanto de silkaĵoj de Suĝoŭ okupas la unuan lokon de la tuta lando eĉ hodiaŭ kaj produktas trionon de la eksportataj silkaĵoj. Ĝiaj produktaĵoj estas eksportataj preskaŭ al ĉiuj landoj de la mondo. Nun Suĝoŭ havas 3 elbobenejojn, 22 teksejojn kaj 7 tinkturejojn, pli ol 10 000 teksmaŝinojn kaj 50 000 laboristojn.

La malnova silka teksejo Dong'u spegulas la disvolviĝon de la silka industrio de Suĝoŭ. La antaŭe tre malgranda teksejo Dong'u nun havas 3 600 laboristojn kaj 800 elektrajn teksmaŝinojn. La fabriko produktas ĉiujare 12 milionojn da metroj da silkaj ŝtofoj de pli ol 50 specoj. La fama tafto de la fabriko karakteriĝas per delikateco, plaĉaj koloroj kaj bona tralasa povo por aero. La brita princo Charles kaj la edzino de la usona prezidento Reagan ŝatas tian ŝtofon.

Suĝoŭ produktas ankaŭ horloĝojn, biciklojn, kudromaŝinojn, fridujojn, lavmaŝinojn, elektrajn ventumilojn, manĝaĵojn k.a. Ĝia elektronika industrio kun certa skalo estis nove leviĝanta en la lastaj jaroj. Nun en la urbo estas pli ol 20 000 laboristoj kaj teknikistoj okupiĝantaj pri produktado de elementoj de ĉ. 100 specoj por telekomuniko, radiosisaŭdigo, televizio, komputilo (inkluzive hardvarojn kaj softvarojn). La Televidila Fabriko de Suĝoŭ produktas ĉiujare 450 000 nigrablankajn televidilojn kun marko Pavo kaj 150 000 kolorajn. La nova 9 000-kvadratmetra domo de la fabriko produktos ĉiujare 500 000 kolorajn televidilojn. La televidiloj produktitaj de la fabriko vendiĝas en Eŭropo kaj sudorienta Azio.


La fridujoj kun marko Ŝjang-ŝjuehaj kaj la elektraj ventumiloj kun marko Granda Muro ĝuas altan renomon en la lando. La Friduja Fabriko de Suĝoŭ havas 1 400 laboristojn kaj ĉiujare produktas 100 000 fridujojn. Las-

tatempe la fabriko enkondukis fremdlandan laborlinion, kiu povas produkti ĉiujare 100 000 du-pordajn fridujojn de tri specoj. En la venonta jaro ĉiu skipo de la fabriko produktos pli ol 400 000 fridujojn. La jara produktokvanto de elektraj ventumiloj kun marko Granda Muro superos 800 000. La pendantaj, tablaj, plankaj, plafonaj ventumiloj vendiĝas en pli ol 20 landoj kaj regionoj de Suda Ameriko, Azio kaj Afriko.


En la lastaj jaroj Suĝoŭ amikiĝis al Kanadzava kaj Ikeda de Japanio, Venecio de Italio kaj Viktorio de Kanado. Per tio Suĝoŭ oftigas sian kontaktiĝon kun tiuj urboj, akcelas la turisman aferon kaj malfermis gravajn kanalojn por disvolvi industrion kaj akiri ekonomiajn informojn. En la pasinta jaro pli ol 180 000 fremdlandaj turistoj vizitis Suĝoŭ.

La Suĝoŭ-a Esperanto-Ligo estas unu el la plej viglaj E-organizoj de Ĉinio. Ĝiaj membroj ofte havas gajan kontakton kun fremdlandaj esperantistoj.

La totemo donacita de la kanada urbo Viktorio al Suĝoŭ por montri la amikecon inter la popoloj de la du urboj.



La pordego Panmen



Strato de Suĝoŭ





En ĝardeno



La antikva Hanŝan-templo

En silka fabriko





Bejsi-pagodo, marko de la urbo



Kontrolo de silkaĵoj


Muntado de televidiloj





Silka brodaĵo

En fabriko de fridujoj



Konkurso inter junaj piedpilkistoj

Maje de 1986 la plej granda junula ĵurnalo de Ĉinio "Ĉina Junula Ĵurnalo" kaj TDK-kompanio de Japanio kune okazigis en Pekino la ĈJJ-TDK-pokalan Internacian Junulan Piedpilkan Ĉampionecan Konkurson, kiun partoprenis la ŝtataj junulaj teamoj de Brazilo, Britio, Francio kaj Tajlando kaj kvar ĉinaj junulaj teamoj.

SENSACIA VENKO DE LA TAJLANDA TEAMO

Sur piedpilka ludkampo venko ofte estas malfacile antaŭvidebla. En la dua matĉo la tajlanda teamo faris grandan sensacion: Ĝi venkis la britan teamon per 2:1.

La brita ludarto estas eminenta. La brita junula teamo fondiĝis antaŭ unu jaro. Ĝiaj membroj plejparte venis el diversaj A-klasaj piedpilkaĵaj kluboj de Britio kaj havas mezalan altan de 1.78 metroj. La teamanoj atakis brave kaj obstine, bone kunlaboris inter si kaj en la unua matĉo venkis la ŝtatan junulan teamon de Ĉinio per 1:0. Tial ĝi opiniis, ke ĝi povos facile venki la tajlandan teamon.

Ĉe la komenco la britaj piedpilkistoj kun alta staturo kaj fortika korpo jam puŝiĝis antaŭ la golejon de la tajlanda teamo.

Sed la malaltkreskaj tajlandanoj ludis lerte kaj sagace. Ili defendis forte kaj serĉis ŝancon por surprizatako. La tro memfidaj

britoj deziris frakasi la rivalon per siaj fortaj atakoj. Tamen la afero iris ne laŭ ilia volo. Iliaj pluraj atakoj estis vanaj. En la intensa konkurso tajlandaj sportistoj fine trovis ŝancon, 15 minutojn post la komenco de la ludo la plej eminenta tajlanda piedpilkisto n-ro 8 kaptis la ŝancon, sola rompis la defendan linion de la brita teamo kaj ŝotis la pilkon en la golejon. Post 6 minutoj la tajlanda teamano n-ro 10, helpate de siaj kunludantoj, enpafis alian golon, profitante malfortan defendon de la brita teamo.

Perdinte du poentojn en 20 minutoj, la britoj ne plu povis sin regi kaj faris sinsekvajn sturmojn, kaj antaŭ la golejo de la tajlanda teamo plurfoje aperis kriza situacio. Sed la britaj sportistoj ludis malpacience, eĉ ne povis plene uzi sian aeron superecon kaj gajnis nenion en pluraj angulŝotoj. 16 minutojn post la komenco de la dua duontempo de la ludo, la tajlanda golulo elglitigis la pilkon en la golejon, kio gajnis al la brita teamo unu poenton.

LA PEKINA TEAMO PACIGIS LA FRANCAN

La franca junula teamo el profesiaj piedpilkistoj havas sian originalan ludarton, kun bona trejniteco, granda rapideco kaj harmonia taktiko. La pekina teamo, kiu renkontis la francan en la dua rondo de matĉoj, estis multe malpli forta ol la lasta.

Ĉe la komenco la pekina teamo tuj aranĝis formacion 4-3-3 kaj laŭplane praktikis la strategion de stabila defendo kaj kontraŭatako je ŝanco-apero. Ĝi komencis jam en la meza ludkampo malhelpi atakon de la franca teamo kaj per siaj membroj postsekvi la danĝerajn francajn avanulojn. La manovro de la pekina teamo atingis la atenditan celon kaj repuŝis la francan atakon. Samtempe kun tio, la pekina teamo pliigis sian forton de atako por kapti la pilkon en la mezkampo, ŝanĝis la formacion en 4-4-2 kaj tiel ŝajne montriĝis pli forta.

Por rompi la senfruktan situacion, la franca teamo plurfoje ŝanĝis sian taktikon kaj senĉese levis novajn atakojn al la golejo de la pekina teamo. En la tuta matĉo la franca teamo 22-foje ŝotis, sed ne sukcesis pro la obstina rezisto de la pekina teamo kaj la lerta pilkokapto de ĝia golulo. La matĉo finiĝis per 0:0. Post la matĉo la trejnisto de la franca teamo laŭdis la pekinan teamon, dirante, ke ĝiaj strategio kaj taktikoj estas ĝustaj kaj ĝiaj membroj kuraĝaj, kio kaŭzis egaligon en la konkurso inter malegalaj fortoj.

VENKO DE LA BRAZILA TEAMO

La finalo okazis inter la brazila kaj brita teamoj.

La brazila junula teamo gajnis du sinsekvajn ĉampionecojn de la Monda Junula Piedpilka Pokala Konkurso, kiu okazas en ĉiu dua



La golulo denove kaptis la pilkon.

jaro. En tiu ĉi konkurso ĝi venkis ĉiufoje, tial ĝi estis la plej probabla ĉampiono laŭ la publika opinio. Kvankam la brita teamo antaŭ la finalo ludis ne tiel bone, kiel la brazila, tamen ĝiaj longa pilktransigo, rapida atako kaj sentimeco kaj la altstatura superco de ĝiaj membroj multe minacis la brazilan teamon.


Je la fajfo de la ĉefjuĝisto la du teamoj komencis decidan batalon. Por fuŝi la taktikon de la rivalo, la brita teamo ne aplikis sian tradician taktikon de longa pilktransigo kaj rapida atako, sed faris rapidan flankan trarompon kaj poste transigis la pilkon direkte al la golejo de la rivalo.


En 10 minutoj la brita teamo kvinfoje atakis la golejon de la rivalo. Ĝiaj fortaj atakoj kvazaŭ premfaligis la brazilan teamon. Tiu lasta ne tuj adaptiĝis al la taktiko de la brita teamo, kaj antaŭ la fortaj kaj rapidaj atakoj ĝiaj membroj konsterniĝis kaj hezitis. Post 15 minutoj ili aplombiĝis kaj tuj rearanĝis sian formacion. Ili unue fortigis sian defendon por malhelpi la fortajn atakojn de la brita teamo.

Pro la senfrukta flanka trarompo, la brita teamo aldonis la tradician taktikon de longa pilktransigo kaj rapida atako por malordigi la formacion ĵus reguligitan de la brazila teamo. Tio tuj efikis. 20 minutojn post la komenco de la ludo la brita teamo longe transigis la pilkon al la golejo de la rivalo. La altstatura brita sportisto n-ro 9 ricevis la pilkon en miksa batalo, driblis ĝin preter du brazilajn sportistojn kaj senhezite ĝin ŝotis en la golejon. La brita teamo la unua gajnis poenton.

La brazila teamo ja estas eminenta teamo. Kvankam ĝi perdis unu poenton, tamen ĝi, ne malpacienca, persistis en sia trapentra taktiko pasigi la pilkon en mallonga distanco kaj kunagi parte. 41 minutojn post la komenco de la ludo la brazila sportisto n-ro 5 kaptis ŝancon de rekta libera ŝoto, ŝirmate de siaj kundudantoj. Li ruze ŝotis la pilkon en la golejon. Montriĝis 1:1 sur la poento-tabulo.

En la dua duontempo de la ludo la brazila teamo liberigis sin de psika premo kaj pli aplombe





atakis la golejon de la rivalo. Perdinte la superecon de unu golo, la brita teamo rapidigis siajn paŝojn por atako. 24 minutojn post la komenco de la ludo tri brazilaj sportistoj, aplikante en strikta kunagado rafinitan kaj varian piedan ludarton, facilmovan driblon kaj lertan pasigon, rapide en-trudiĝis kaj rompis la defensivon de la brita teamo kaj enpafis la decidan golon. Poste la brita teamo plenenergie levis atakojn, sed ne sukcesis. La brazila teamo venkis per 2:1 kaj gajnis la ĉampionecon.

OPINIO DE LA ĈINAJ TEAMOJ

En la konkurso partoprenis kvar ĉinaj teamoj. Escepte de la ŝtata junula teamo, la aliaj tri kun pli da malvenkoj ne estas menciindaj. Tamen la ĉinaj piedpilkistoj kaj trejnistoj vidis en siaj malvenkoj la diferencon inter si kaj la fortaj teamoj en ludarto, taktiko kaj mensa kulturo kaj konkludis, ke oni nepre devas serioze reformi la ĉinan piedpilkan trejnadon. Tio estas la plej granda gajno de la ĉinaj piedpilkaj teamoj en la konkurso.

Konkurso



Iri al lumo de tie ĉi

— Pri Lingjŭan-prizono

Sub brilaj lampionoj oni gaje kantas kaj dancas akompanate de tamburado. Ĉu tio ĉi havas ian rilaton al "krimuloj" devigitaj labori kaj sin transformi? Jes. Jen prezentado de krimuloj. Tion mi vidis en malgranda halo de la prizono de Lingjŭan-gubernio, Ljaŭning-provinco, en la unua vespero post mia alveno.

Provosoĵ diris al mi, ke komence la krimuloj ne estis tiaj. Tiam ili, malgajaj kaj senesperaj, opiniis ke ilin atendas karceri, policista bastono, malvarma mieno de la provosoĵ kaj peza fizika laboro. Tamen post iom da tempo ili konsciiĝis el la prizona vivo, ke tie estas ne nur loko por ilin puni, sed ankaŭ speciala lernejo por reeduki ilin kiel utilajn homojn.

ŜLOSILO DE ILIA ANIMO

Lingjŭan-prizono, situanta en malproksima loko limtuŝanta la provincojn Ljaŭning kaj Hebej kaj Internan Mongolion, ĉefe akceptas plenaĝajn krimulojn kondamnitajn al 3-jara kaj eĉ pli longa mallibereco. Ĉe la komenco post enprizoniĝo pliparto de ili malamike traktis ĉion en la ĉirkaŭaĵo, precipe la provosoĵn. Iuj traktis transformadon pasive, aliaj faris senkaŭzajn apelaciojn foje refoje. La prizono opiniis, ke tiuj krimuloj unue devas koni


kaj obei leĝon, konfesi sian krimon. Sekve, la prizono petis advokatojn fari juran edukadon al ili, al la apelaciantoj oni konigis leĝajn bazojn de ilia kondamnado, por ke ili plene konvinkigiu, kaj firme subtenis tiujn, kiuj apelaciis kun sufiĉe da kaŭzoj. Tial ili konis la majestecon kaj justecon de la leĝo.

Krimulo Ŝju Lej estis kondamnita al 15-jara mallibereco pro seksatenco. Enprizoniĝinte li estis neobeema kaj sin senkulpigis, ke li ne faris krimon. La prizono, analizinte lian dosieron, opiniis, ke lia krimeco estas evi-

denta, sed la kondamno al li nekonvena. Sekve ili interkonsiliĝis kun la kortumo, kiu kondamnis lin. Rezulte oni reekzamenis lian apelacion kaj li estis rekondamnita al 8-jara mallibereco pro friponaĵo. Tio emociis Ŝju Lej ĝis larmoj. Li diris: "Por ne maljuste trakti min, vi faris multajn laborojn, kio konvinkis min, ke la provosoĵ estas fidelaj al la leĝo. Mi certe bone min transformos." Li kore konfesis sian krimon, kio grave influis aliajn krimulojn.

Mi faris al multaj provosoĵ jenan demandon: Kio estas la

Malliberuloj bredas porkojn en la prizono.



efika rimedo por transformi krimulojn. La respondo estas preskaŭ sama, t.e. trakti ilin kiel homon por vekti ĉe ili la homan dignon kaj hontemon, ĉar krimuloj estas objektoj sub diktaturo, se la socio malestimas ilin, do ili ne estimas sin mem. Ili sentas sin senesperaj kaj tial ili rezistas kontraŭ transformado. La provosoj faras penigan laboron por vekti ilian konsciencon.

Vagisto-ŝtelisto Hu Ĉangŝin estis kondamnita al 12-jara mallibereco. Post malliberiĝo li ofendis la provosojn per malĝentilaj vortoj kaj sakraĵoj. Li ŝajnis sin malsana, nenion manĝis kaj faris ĉikanon, deklarante, ke li aŭ sin mortigos aŭ forfuĝos. La provosoj ne simple katenis kaj izolis lin. Ili faris enketon kaj trovis, ke la eksedziniĝo faris lin anormala. Sekve ili skribis al lia eksedzino pri lia sopiro al ŝi. Post nelonge ŝi venis al la prizono de malproksime. Ĉe la renkontiĝo ili implikiĝis en pensoj kaj ekploregis. Ŝi lin konsolis: "Kvankam ni jam eksedziĝis, tamen mi atendas vin la tutan

vivon, se nur vi honeste vin transformados kaj fariĝos nova homo." Hu ege emociiĝis kaj diris: "La provosoj traktas min tiel bone. Se mi ne fariĝos nova homo, mi ne revenos hejmen!" La renkontiĝo donis al li esperon kaj li komencis serioze labori.

Tiaj ekzemploj estas sennombraj. La provosoj helpas krimulojn solvi malfacilojn en ilia laboro kaj vivo, kaj eĉ aĉetas nutraĵon por malsanaj krimuloj per sia privata mono. Multaj provosoj plurfoje pasigis festojn ne kun siaj familianoj, sed kun krimuloj en la karceroj.

BONA MEDIO POR TRANSFORMO

Malpura medio povas tordi homan animon, kaj pura kaj bonorda medio verŝas lumon sur malhelan animon. Enirinte la prizanon kun altaj muroj, mi trovis, ke tie estas ĉio krom libero. Faktoj pruvis, ke tie estas bona medio por ke la krimuloj estu transformataj kaj reakiru liberon kaj lumon.

La loĝejo de la prizono konsistas el karceroj, manĝejo, hospitalo, klasĉambroj en la ĉirkaŭaĵo kaj ludkampoj de korbo-pilko kaj flugpilko en la centro. Ĉirkaŭ la ludkampoj estas trotuaro pavimita per ruĝaj brikoj. Ambaŭflanke de la trotuaro aromas floroj. Tie verdas arboj kaj kuŝas fontano, fiŝbredejo kaj arta monteto. Tia ĝardeno medio estas vere plezuriga!

Enirinte la loĝejon, mi vidis, ke ĝi estas hela kaj pura. Litkovriloj, lavtukoj kaj pelvoj estas en bonordo. Ĉiu ĉambro estas provizita per unu televidilo. Sur la muroj pendas tuĉpentraĵoj, olepentraĵoj, ŝaŭmoplastaj pentraĵoj kaj metiartaĵoj faritaj de la krimuloj mem. Sur la fenestrobretoj estas miniaturaj pejzaĝoj, envazaj floroj kaj akvarioj. Se vin ne atentigus la ferbarilo ekster la fenestroj, vi eble pensus, ke ĝi estas loĝejo de studentoj de belarta instituto.

Laborejo estas ĉefa loko, kie krimuloj faras devigan laboron. Plejmulto da ĉinaj prizonoj prenas devigan laboron kiel unu el la gravaj rimedoj por transformi la krimulojn. Tio ne nur povas devigi krimulojn krei ekonomian valoron por la socio, sed pli grave donas al ili ŝancon okupi sin pri produktado kun ekonomia efiko, kiu povas forigi de ili la malbonan kutimon malestimi laboron kaj ĉasi komfortecon kaj kulturi ilian memkonscion en obeado al la leĝoj kaj observado al la disciplinoj. Samtempe per laboro ili povas ellerni metion por sin vivteni kaj radikale forigi la danĝeron fari novan krimon.

Lingjŭan-gubernio ne estas fama, tamen aŭto kun marko Linghe produktita de Lingjŭan-prizono ja estas landfama. Ĝi vendiĝas en 28 provincoj, muni-

Malliberuloj en legoĉambro



cipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando. Ĝia produkta memmunta povo estas en unuaj lokoj en la lando. Ĝia jara produktokvanto superas dek mil, interalie tiu de ŝarĝaŭtoj kun mezgrada ŝarĝkapablo okupas la trian lokon en la tuta lando.

Enprizoniĝinte, la krimuloj estas tuj senditaj al la loko por fari teknikan laboron. Multaj el ili komence sciis nenion pri tekniko, sed jam fariĝis lertaj teknikistoj ĉe la liberiĝo. Plimulto de ili ricevis ateston pri teknika rango donita de la ŝtato. Multaj krimuloj liberigitaj el la prizono disvolvas sian teknikan kapablon kaj estas metitaj sur gravajn postenojn. Iuj fariĝis teknikistoj, inĝenieroj aŭ sekciestroj, aliaj estis elektitaj kiel teknikaj renovigistoj aŭ antaŭenirantaj laborantoj.

Baj Ŝumin de la urbo Ĝinĝoŭ, liberigita de la prizono, fondis aŭtoriparejon. Li akceptis speciale junajn senlaborajn deliktulojn. Li diris: "Mi faris krimon. Mi ne volas, ke la geknaboj ripetu tion." Li penis bone administri la riparejon kaj aplikas en produktado teknikajn sciojn lernitajn en la prizono. En la unua jaro la produktovaloro atingis 250 000 jŭanojn. Li kreis ekonomian valoron, kaj ankaŭ faris kontribuon al stabileco de la socia ordo.

PUNTEMPO — LERNO-TEMPO

En Lingjŭan-prizono granda parto de la krimuloj estas junuloj, kiuj plejparte estas analfabetoj aŭ duonalfabetoj. Multaj junuloj faris krimojn pro nescio. Por ke la krimuloj fariĝu laborantoj posedantaj sciojn kaj teknikojn post la liberiĝo, la prizono fondis profesion teknikan lerne-

jon Juŝin, kie ili lernas juron, fakajn teknikojn, arton, fremdajn lingvojn k.a. Pli ol 90% de la krimuloj partoprenis en la lernado. Por garantii regulan instruadon kaj senĉesan altigon de la instrua kvalito, la prizono aĉetis multajn librojn, kajerojn kaj instruajn instalaĵojn, kiaj televidilo, projekciatoro kaj magnetofono, kaj ellaboris rigoran instru-administran regularon. En la lernejo estas librejo, referencujo kaj legoĉambro. Oni elektis iujn krimulojn, kiuj bone kondukas en la transformado kaj posedas certajn kulturajn kaj teknikajn sciojn, kiel profesiajn aŭ portempajn instruistojn. La lernejo alprenas ĉiajn rimedojn por stimuli la lernodeziron ĉe la krimuloj. Ekz., ĝi konservas la ekzamenajn rezultojn en arkivo kaj rigardas ilin kiel referencon por punredukto. Ĝi permesas al la krimuloj partopreni la egalajn eduknivelajn ekzamenojn kaj donas diplomon al la sukcesintoj en la ekzameno, kiu estas unu el la atestoj por ilin enoficigi post liberiĝo el la prizono. De la lastaj jaroj miloj da krimuloj ricevis diplomon pri la klereco de mezlernejo. Iuj krimuloj ankaŭ partoprenis la tutlandan konkurson pri legado kaj estis premiitaj.

Krom la regula edukado la prizono aranĝis ankaŭ diversajn aktivadojn por riĉigi la spiritan vivon kaj kulturi belan spiriton de la krimuloj. Ĝi abonis por la krimuloj nombron da gazetoj kaj ĵurnaloj kaj ofte aranĝas por ili viziton al fabrikoj kaj vilaĝoj, por ke ili konu la ekonomian konstruadon de la lando. La prizono establis ensemblon de krimuloj kaj okazigas pilkan kaj atletikan konkursojn. Krome, ĝi ankaŭ aranĝas al la krimuloj viziton al famaj antikvaj restaĵoj kaj pitoreskejoj por pli-

fortigi ilian amon al la patrio. La provosoj kune kun la krimuloj partoprenas en aktivadoj, en kiuj ili interŝanĝas siajn pensojn, kio levas la memestimon de la krimuloj.

Transformi krimulojn estas peniga socia laboro, kiun la prizono sola ne povas plenumi. Ĝi vaste mobilizas sociajn fortojn por plenumi la laboron. La prizono ofte invitas diversa-socitavolajn personojn kaj ensemblojn fari lekciojn, prezentadon, kaligrafiajn kaj pentraĵojn. Ĝi invitas registarajn funkciulojn de la koncernaj regionoj kaj parencojn de la krimuloj al la prizono, por ke tiuj rakontu al ili pri la hejmloko kaj esprimu siajn bondezirojn kaj esperojn al ili. Multaj krimuloj diris kun emocio: "Ni trovas tian helpon sincera kaj konfida. Ĝi donas al ni esperon."

PONTO DE KRIMULOJ

Sincereco povas emocii eĉ senkorulojn. Dank' al la pacienca persvado kaj edukado de la provosoj, plejparto de la krimuloj decidas forlasi siajn antaŭajn malbonojn kaj fariĝi novaj homoj. Iuj, enkarcerigitaj pro ŝtelado kaj prirabado, memvole oferis monon por helpi la lokojn, kie okazis naturaj katastrofoj. Foje al krimulo Liŭ Ŭenŝan estis permesite tranokti hejme. La sekvantan tagon sur la revena vojo li vidis du junulojn batantajn unu la alian. Neniu el la apudstarantoj kuraĝis ilin apartigi. Li brave elpaŝis kaj apartigis ilin. Tio ofendis la du interbatantojn. Kaj li trankvile admonis: "Mi malkaŝe diru al vi, ke mi estas krimulo. Mi admonas vin, ke vi ne interbatu. Mi ja estas kondamnita pro vundo en interbato. Ne ripetu mian eraron!" Emociiĝinte la du ju-

nuloj formetis batilojn kaj interpacigiĝis. Tiu incidento profunde impresis la rigardantojn.

La liberigitaj krimuloj plejparte povas ricevi tri atestojn, nome atestojn pri liberiĝo, klerco kaj teknika rango. La tri atestoj markas la komencon de ilia nova vivo. La socia specimena enketo montris, ke la liberigitaj de la prizono estas bonvenaj al la socio.

Ljang Ŭejŝjun estis kondamnita al 7-jara mallibereco pro friponaĵo. En 1983 li estis liberigita kaj eklaboris en la Lokomotiva Fabriko de Ŝenjano. Tiam la fabriko alfrontis bankroton. Li donis garantion, ke li turnos la fabrikon deficitan en profitodonan. Post unu jaro la fabriko ekhavis 20 000 jŭanojn da profito, krom kovri la antaŭan deficiton de 80 000 jŭanoj. Trapasinte la ekzamenon, li estis nomumita kiel estro de la teknologia sekcio de la fabriko. En 1984 la fabrikestro vizitis la prizanon kune kun li por esprimi sian dankon, ke la prizono kulturis kapablulojn por la socio.

Post 7-jara mallibereco, Ŝju Ĝijun kondamnita pro mortigo en interbatado eklaboris en la Fabriko de Izola Materialo por Radioaparato de Ŝenjano. Li iniciateme sin anoncis al la fabriko por helpi la dekelkajn malbonkondutajn junulojn, kun kiuj neniu volis labori. Li edukis ilin per sia propra travivaĵo, gvidis ilin en teknika renovigo kaj akiris sukceson. Li fariĝis asist-inĝeniero kaj nun li estas estro de la teknologia sekcio de la fabriko.

Laŭ nekompleta statistiko, inter la liberigitaj, kiuj eliris el la prizono en la lastaj jaroj, estas pli ol 20 nomumitaj diversnive-



Malliberuloj en amuza kunveno



Nove produktitaj aŭtoj kun marko Linghe

laj estroj, 6 ordinaraj funkciuloj kaj dekoj da labormodeloj, antaŭenirantaj laborantoj kaj in-

dividuaj entreprenistoj. Kaj la procentaĵo de recidivuloj ne superis 3% de la liberigitaj.

KURANTAJ AFEROJ

LA KAMPARA KOMERCAJA EKONOMIO DE ĈINIO EN STABILA DISVOLVIĜO

Nun stabile disvolviĝas en reformado la kampara komercaja ekonomio de Ĉinio. Dank' al la reordigo de la kampara ekonomia strukturo kaj grandpaŝa antaŭeniro de la monopola aĉetsistemo de la agrikulturaj produktaĵoj, la varprocentaĵo de la industria kaj agrikultura produktaĵoj de la ĉinaj kamparoj en 1985 atingis 63.9%. Ĉiu laborulo havigis al la socio komercaĵojn je 25.8% pli multe ol tiun en 1984. Krome, okazis novaj ŝanĝiĝoj en entreprenoj de komercaja produktado kaj en cirkulado de komercaĵoj. La skalo de la entreprenoj en la vilaĝoj kompare rapide pligrandiĝis. Rimarkinde kreskis la nombro de homoj, kiuj sin okupas pri la sekundara kaj terciara industrioj. Ili konsistigas proksimume 20% de la totala nombro de laborfortoj en ĉinaj kamparoj. La transporta kapablo en la kamparoj evidente altiĝis. Nun en Ĉinio jam estas ĉ. 600 000 specialigitaj familioj en transportado kaj la nombro de la ŝarĝaŭtoj de kamparanoj atingis 260 000. La nombro de diversspecaj traktoroj atingis kvar milionojn. En Ĉinio iom post iom formiĝas kaj perfektigiĝas la kondiĉoj



En la Komputila Centro de Ĉinio

por disvolvi la kamparan komercajan ekonomion.

RAPIDA PROGRESO EN APLIKO DE KOMPUTILOJ

En la lastaj jaroj Ĉinio akiris rapidan progreson en apliko de komputiloj.

Ĉinio komencis la komputilan esploradon en 1956. La studobjektoj pri komputila apliko, kiuj akiris sukceson tra Ĉinio, kreskis de centoj en 1980 ĝis 20 000 en 1986. La sukceso en farado de help-projekt-softvaro de reg-sistema komputilo akirita lastatempe de Ĉinio plenigis la blankon en granda nombro da operacioj de aŭtomata reg-sistemo kaj help-projekt-softvaro. Ĝi bone funkcias en operacioj kaj estas internacie avangarda en analizo, projektado

kaj sintezado de reg-sistemo. La simila informo aŭdiĝis neniam antaŭe eĉ internacie.

ĈINIO FARIĜIS EKSPORTA LANDO DE KOTONO

En la lastaj tri jaroj Ĉinio havis grandan disvolviĝon en eksportado de kotono kaj fariĝis eksporta lando de kotono. Nun pli ol 30 landoj kaj regionoj importas kotonon el Ĉinio.

DAĜJANG-ELEKTREJO DONAS ELEKTRON


La duperioda konstruado de la baraĵo Geĝoŭba estis fundamente plenumita. La unua generatoro kun kapacito de 125 000 kilovattoj komencis doni elektron la 9-an de junio al la provincoj Hubej, Hunan, Henan kaj Ĉjangŝji tra transsenda lineo kun ultraalta tensio de 500 000 voltoj. Tio ne nur ludas gravan rolon en mildigo de la grava streĉiteco en elektroprovizo en la centra Ĉinio kaj aliaj lokoj, sed ankaŭ markas, ke la baraĵo Geĝoŭba, la plej granda akvoutiliga pivota konstruaĵo de Ĉinio, komencis doni plenumplenan profiton kaj efikon.

Daĝjang-elektrejo konsistas el 14 generatoroj kun totala kapacito de 1.75 milionoj da kilovattoj. Antaŭ la fino de 1986 aliaj tri generatoroj kun kapacito de 375 000 kilovattoj donos elektron. Kaj la ceteraj dek generatoroj ekfunkcios en la venontaj du jaroj.

Svetera fabriko funkciigata de vilaĝo de Cangŝu-gubernio



Eklaboras la unua generatoro de Daĝjang-elektrejo.



Ili revenas en la socion

Mi volas malfermi kurtenon, malantaŭ kiu estas kriplula mondo, malatentata antaŭe.

En la kriplula mondo de Ĉinio vivas 20 milionoj da kripluloj. En plejparto de la ĉinaj urboj pli ol 70% de la laborkapablaj kripluloj laboras sur sia posteno. Kaj iuj urboj jam solvis la problemon pri enoficigo. En la kamparo ne estas senlaboraj laborkapablaj kripluloj. Kun disvolviĝo de la ŝtata ekonomio, la bonstatigaj aferoj por kripluloj prosperas ĉie tra la lando kaj solviĝis por ili la problemoj pri vivteno. Kaj tamen ili restis ekster la socio en multaj kampoj, ekz. en la kinejoj kaj magazenoj

ne troviĝas dekliva vojo, tiel ke la kripluloj en rulseĝoj ne povas rigardi filmon, nek aĉeti varojn. Ĝenerale dirite, la kripluloj havas kompare malmulte da ŝancoj por esti klerigitaj kaj ilia kultura nivelo estas malalta. Tio malfaciligas ilin en elekto de profesio. Ilia enspezo estas malmulta kaj socia pozicio malalta.

Nun inter la kripluloj en la mondo cirkulas slogano: "Reveno en la socion". La simila problemoj troviĝas ankaŭ en la ĉina kriplularo. Nun la ekonomia reformo iras en ĉiuj kampoj kaj la popola vivo pli kaj pli altiĝas. La fabriko kun la kripluloj kiel la ĉefaj laboruloj tamen

ne havas forton partopreni en la konkurenco. Sen leviĝo de la vivnivelo de la kripluloj, do ilia vivnivelo fakte malleviĝas kompare kun tiu de la sanaj homoj. Jen evidentiĝis la kontraŭdiroj inter la kripluloj kaj la ordinaraj homoj. Ili bezonas prizorgon kaj helpon de aliaj. La tuta socio devas atenti la bonstatigon de la kripluloj kaj helpi ilin reveni en la socion.

KLOPODO DE DENG PUFANG

Li, rondvizaĝa, kun mallonge tondita hararo kaj okulvitroj, estas ĉiam optimisma, serena kaj memfida. Li nomiĝas Deng



S-ro Deng Pufang kaj la franca kantistino Mireille Mathieu

Pufang, la unua filo de kamarado Deng Ŝjaŭping, prezidanto de la Konsilista Komitato de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. En la 60-aj jaroj, kiam li studis en la fizika fakultato de la Pekina Universitato, li estis envolvita en la torrenton de la malbeninda "kultura revolucio". Kiam Deng Ŝjaŭping (la tiama ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de KPĈ) estis atakita per kalumnioj, ankaŭ li estis terure turmentita. Li postvivis la mallumajn jarojn, sed fariĝis paraplegiulo. Forvaporigis lia revo fariĝi fizikisto. Anstataŭ la gaja studenta vivo, lin akompanis longtempa kaj monotona vivo en malsanulejo. Sed sufero kaj konfuziĝo ne deprimis lin. En 1980, kiam li estis kuracata en Kanado, li estis inspirata de la tiea resaniga afero kaj decidis fari ion utilan por la ĉinaj kripluloj.

Reveninte en la patrujon, li kaj lia kripla amiko Ŭang Luĝuang kune petis la aŭdiencon

kaj helpon de la ministro pri civila administrado kaj ministro de higieno kaj sinsekve vizitis dekelkajn personojn famajn en la socio. Sub ilia aŭspicio ili komencis la preparadon de la Ĉina Kriplula Bonstatiga Fonduso. Estas ne facile sukcesigi ian gravan aferon eĉ por sanaj homoj, kio do estis pli malfacila por seriozaj paraplegiuloj, kiaj Deng kaj Ŭang. Ili en rulseĝo serĉadis ĉie helpon kaj persvadis koncernajn personojn. Kaj fine en marto, 1984 ili starigis la Kriplulan Bonstatigan Fonduson. Deng kaj Ŭang estis elektitaj kiel prezidanto kaj vicprezidanto de la fonduso respektive. En kelkaj monatoj la fonduso kolektis ĉirkaŭ si aron da gejunuloj, kiuj volonte sin dediĉas al la bonstatiga afero de ĉinaj kripluloj kune kun Deng Pufang. Nun en la sidejo de la fonduso laboras pli ol 20 laborantoj kaj krome ĝi havas pli ol 90 konsilantojn kaj honorajn prezidantojn, famaj en la socio.

POST FONDIĜO DE LA FONDUSO

Akceli la registaron fari konkretajn difinojn por protekti la interesojn de la kripluloj pri laborigo, eduko, kuraco kaj bonstatigo estas unu el la taskoj de la fonduso. Dank' al la aktivaj kontakto, alvoko kaj kunordigo de la fonduso, la ĉina registaro publikigis "Sciigon al Superaj Lernejoj pri Akcepto de Kriplaj Gejunuloj kaj enoficigo de la Diplomitoj". En 1984 superaj lernejoj sume akceptis 301 kriplulojn en la tuta lando, kio kreis rekordon tiusferan. Poste la Ministerio de Financoj ellaboris "Sciigon pri Senigo de Komerca Imposto al la Individuaj Komercejoj kaj Entreprenoj Funkciigataj de Kripluloj", kiu multe akcelis la disvolviĝon de la produkto de la socia bonstatigo kaj individuaj entreprenoj funkciigataj de kripluloj, laborigon de la kripluloj.

Alia tasko de la fonduso estas plene propagandi socialisman



Kaligrafado per ŝultro

humanismon por ke la tuta socio respektu, prizorgu kaj helpu la kriplulojn.

Je la 1-a de januaro, 1985, en la grandioza Pekina Hotelo la fonduso okazigis grandan novjaran kunvenon, la servistoj fervore traktis ilin kiel honorajn gastojn. En la komforta kunvenejo oni prezentis belajn amuzajn programerojn, kio tre gajigis la kriplulojn.

Por partopreni la Duan Mondan Laborkapablan Ĉampionecon Konkurson de Handikapuloj, en Kolombio, 1985, la fonduso organizis preparan konkurson pri plektado, teksado, pentrado, kaligrafio, modlado de homfiguroj, glavofarado, horloĝ-riparado, tornado, ksilografio, tajlorado, fremdlingva tajpado, reklama arto, televidil-riparado k.a. Tio ja ne estis ordinara konkurso. Unu kriplulo, tenante per la dentoj alterne diverskolorajn penikojn, post momento aperigis sur papero jen birdon, jen beston. Unu kripla horloĝ-riparinto per unupiedaj fingroj premis brakhorloĝon kaj per ali-piedaj fingroj firme tenis la riparilon kaj lerte riparis la malgrandan maŝinon. Li estis neniom malpli lerta ol brodanta knabino. Rigardante la prezentadon, la apudestantoj estis senescepte ravitaj de la supera arto de la kripluloj kaj admiris ilian streban spiriton.

Marte de 1984, la fonduso organizis faradon de la dokumenta filmo "Defio al la Sorto", junie filmigis la televidan filmon "Senbraka Knabo" kaj poste la rakontan filmon "Saluton, Aĉeng!" Antaŭ nelonge oni komencis filmigi alian rakontan filmon pri kripluloj. Koncerne tion, Deng Pufang kaj Ŭang Lugŭang diris, ke ili fine malfermis la pordon de la ĉina filmo.



Surda-mutuloj prilaboras tapiŝon.

La fonduso akceptis ĵurnalistojn el Britio, FR Germanio, Francio, Japanio, Kanado kaj Hongkongo. Ĝi informas la tutan mondon, ke la stato de la ĉinaj kripluloj estos efektive kaj multe plibonigita.

La grava konstruo de la fonduso — Renormaliga Centro finkonstruiĝos ĉi-jare. La centro situas en Pekino. Ĝi importis parton de avangardaj ekipaĵoj kaj teknikoj kaj aplikos ĉefe la tradiciajn renormaligajn rimedojn de Ĉinio, kiaj Ĉigong-o, masaĝo, akupunkturo kaj mokso k.a. Tie estos 200 malsanulaj litoj. La centro estas destinita ĉefe por renormaligaj studo kaj instruado. La fonduso planas, ke starigos sian centron ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj.

LA SOCIA SUBTENO

La socio donas al la fonduso multflankajn subtenojn, unu el kiuj estas monkontribuo. La entreprenoj, kulturaj departementoj, armeo kaj individuoj fervore traktas ĝin. Prenu kiel ekzem-

plon Ŝenĝen en la Suda Ĉinio, kie estas nur 200 000 loĝantoj, kies proksimume 1/5 faris monkontribuon. Krome, la urbo Ŝenĝen metis la konstruon specialan por la kripluloj en sian urban projekton. Ili konstruos apartan vojon por la kripluloj en magazeno, teatro, kinejo kaj aliaj publikaj lokoj. Tio sendube influos aliajn urbojn.



Ĝojo en korto de kamparana familio

Sufiĉe multaj domoj de la urboj kaj kamparo de Ĉinio havas kortojn antaŭ aŭ post si. La mastroj laŭ sia ŝato zorgeme ornamas sian malgrandan spacon.

Ni rigardu kelkajn kortojn de kamparanaj familioj en Liŭhangvilaĝo ĉe la antaŭurbo de Zibo, Ŝandong-provinco. Plejparto el la 230 familioj de la vilaĝo loĝas en etaĝdomoj. Ĉiu domo havas korton kun ĉirkaŭmuro el grizaj brikoj kaj fera aŭ ligna pordo. Preskaŭ en ĉiuj kortoj kaj sur ĉiuj balkonoj estas florzvoj. En iuj

kortoj verdas legomoj kaj vinberujoj.

Negranda estas la korto de la 48-jara kamparano Ŭang Ŝiĉŭan. En ĝia dekstra flanko kreskas tomatoj, lentoj k.a. kaj en ĝia maldekstra flanko, kiu okupas du trionojn de la korto, kaj sur la balkonoj bonorde staras pli ol 200 florzvoj, en kiuj estas granatujoj, pinoj, ulmoj, ĉiamverdajoj, pendantaj orkideoj, vintra-jasmeno, hibiskoj, hortensioj, gardenioj k.a. La mastro diris al mi, ke en lia korto oni povas vi-

di la kvar sezonojn. En marto abrikotarboj kaj vintra-jasmeno plej frue elspiras printempon, kaj floroj flavaj, rozaj kaj ruĝaj altiras al si abelojn kaj papiliojn. En frusomero, la branĉoj de gardenioj interplektas sin kun tiuj de ileksoj, la floroj de gardenioj ŝajne disvolviĝas sur la branĉoj de ileksoj kaj la folioj de ileksoj ŝajne kreskas el trunkoj de gardenioj. Inter ili ruĝe floras la granatujoj. En aŭtuno, oranĝetoj kurbigas la branĉojn, aromas ĉinaj rozoj. En ĉiu Aŭtunmeza

La familio de Ŭang Ŝiĉŭan



Festo la membroj de tri generacioj de la familio sidas en la malgranda ĝardeno kaj ĝuas lunkukojn kaj arakidojn sub la aparte brila luno. En vintro la pinoj kaj ileksoj verdas en frosto, kio donas forton kaj memfidon.

Ŭang Ŝicūan de sia infaneco ŝatas florojn, sed nur en la lastaj jaroj li komencis planti kaj kulturi ilin. Mi trovis, ke multaj el la envazaj miniaturaj pejzaĝoj estas faritaj de li el zorge stucitaj malaltaj kadukaj arboj. La arboj en la vazoj ŝajnas esti miniaturoj de antikvaj arboj en montaro. Ilj prezentas la naturan belecon en tre malgrandaj vazoj. En tiuj vazoj kreskas kelkdek- ĉ centjaraj arboj. Iuj el ili ĉ floras kaj donas frukton. La ŝtonejoj en vazoj similas al leono aŭ elefanto, kio mirigas rigardantojn. Lia 78-jara patrino diris, ke li, kvankam tre laca post taga laboro okupiĝas pri stucado kaj akvumado de la plantoj forgesante preni manĝon.

La avino ĝoje diris al mi, ke ŝi preparas manĝon hejme, ŝiaj

filo kaj bofilino laboras en kampo, iu nepo vizitas lernejon kaj aliaj du laboras en la bremsa fabriko funkciigata de la vilaĝo. En 1985 la familio enspezis pli ol 20 000 jŭanojn (3.2 jŭanoj egalas al unu usona dolaro). La familio de Ŭang Ŝicūan estas sufiĉe riĉa en la kamparo kaj posedas 13-ĉambran domon, rigardantan suden. La gastoĉambro estas bone meblita kaj provizita per telefono. Lia familio disponas televidilon, magnetofonon, lavmaŝinon kaj fridujon.

De Ŭang Ŝicūan mi informiĝis ke krom terkulturi, la kamparanoj de Liŭhang-vilaĝo laboras ankaŭ en bremsa fabriko, veldejo, ledajejo. En la vilaĝo estas ĉiovendejo kaj amuza cen-

tro kun artefarita glitejo, naĝejo, eksponejo, arta lageto kaj ludejo. En 1985 la pokapa meznombra enspezo de la vilaĝo atingis 2 129 jŭanojn kaj pli ol 50 familioj enspezis po pli ol 10 000 jŭanoj.

Post riĉiĝo, Liŭhang-vilaĝo iniciate fondis amikajn rilatojn kun Zaŭjŭan-vilaĝo de Jan'an, Ŝenŝji-provinco, kaj proksima sed malpli riĉa Hŭangtaj-vilaĝo. Liŭhang-vilaĝo elspezis 60 000 jŭanojn por Zaŭjŭan-vilaĝo en ilia fiŝbredado, lerneja konstruo kaj aĉeto de arbidoj, investis 27 000 jŭanojn al Hŭangtaj-vilaĝo por helpi ĝin disvolvi var-produktadon, kaj oferis sume ĉ. 80 000 jŭanojn al la Infana Fonduso, lernejoj kaj vojoriparado de Boŝan-distrikto en Zibo.

Ŭang Ŝicūan flegas envazajn florojn.

Loĝdomoj de kamparanoj de Liŭhang





GĜNG GĜNGJE:

En la hejmloko de la reĝo de floroj

En ĝardeno de peonioj

Peonio estas kaj ordinara kaj valora en Ĉinio. Pro sia belega aspekto ĝi estas honorita kiel “la plej ĉarma floro de Ĉinio” kaj “la reĝo de floroj”. Ĝi videblas preskaŭ ĉie, ĉu en parkoj, ĉu en kortoj, ĉu en kamparo.

Peonio estas falfolia arbedo el ranunkolacoj, kun kultura historio de pli ol 1 500 jaroj en Ĉinio. Jam en la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420 — 589 p.K.) ĝi estis multe ŝatata ornama planto. En Tang-dinastio (618-907 p.K.) peonio prosperis en la ĉefurbo Ĉang’an (nun Ŝĵian de Ŝenŝji-provinco) kaj Lŭojang de Henan-provinco.

*Nur peoni’ prezentas landnivelan ĉarmon,
Florado ĝia eĉ mirigas la ĉefurbon.*

Tio estas versaĵo de Liŭ Juŝĵi, poeto de Tang-dinastio. En la unuaj jaroj de la regado de la imperiestro Ĝja Ĝing (1522-1567p.K. sur trono) de Ming-dinastio, peonioj prosperis ankaŭ en Ĉaŭĝoŭ (nun Heze) en la okcidenta parto de Ŝandong-provinco. Laŭdire, antaŭ pli ol 400 jaroj Ĝaŭ Ĵujbo, florkultivisto de la vilaĝo Ĝaŭloŭ en

la antaŭurbo de Heze, iris al multaj lokoj por kolekti rarajn florojn. En la montaro Ĉinling li trovis peoniojn ruĝan, blankan, purpuran kaj rozan. Poste li trovis dekelkajn variojn de peonioj en la urbo Lŭojang. De tiam la peonioj de Heze famiĝis kaj multiĝis en la lando.

En ĉarma printempo mi veturis al la vilaĝo Ĝaŭloŭ. Tuj ĉe la urbo mi jam flaris agrablan bonodoron de la floroj. Ambaŭflanke de la vojo koketis peonioj de diversaj varioj. Estis homa fluo sur la vojo, kaj multaj venis por la peonioj. Atinginte Ĝaŭloŭ, mi vidis peonian parcelon kun areo de 72 hektaroj. Tie kreskis pli ol 300 varioj de peonioj ruĝa, flava, blua, blanka, nigra, verda, purpura kaj roza. Mi dronis en maro de floroj. Ĝaŭ Ŝĵaŭĉing, juna fakulo en la vilaĝo, detale konigis al mi famajn variojn de peonioj.

Tie pompis iu vario kun dikaj kaj plurtavolaj petaloj brile ruĝaj. Ĉarmis alia vario delikata kaj neĝblanka. Tage ĝi ne tre okulfrapis, sed vespere ĝia koloro brilis kiel perlo, bone videbla

de malproksime. La plej valoraj varioj estas nigra kaj verda. Tie mi vidis purpure nigran peonion kun multtavolaj petaloj kaj verda stameno, kiel drako kuŝanta en nigra lago. La verda peonio varias dum sia florado. Ĝi aspektas kiel smeraldo ĉe la komenco kaj verdetas kaj neĝblankas antaŭ la velkiĝo.

Ĝaŭ Ŝjaŭcing ĝoje kondukis min antaŭ purpurajn peoniojn. Li diris: "Jen specio kun historio de 300 jaroj. En 'Notoj pri Strangaĵoj de Ljaŭĝaj', fama novelkolekto de Ĉing-dinastio, estas am-rakonto pri peonia amatoro de Lŭojang kaj peonia feino de Ĉaŭĝoŭ. La rakonto ja fontis el tiu peonio." Iu peonio interesis min. Ĝi altas ĉ. 1.5 metrojn kun dek floroj flavaj, ruĝaj, bluaj, blankaj kaj nigraj. La mastro diris al mi, ke ĝi nomiĝas "Dekflora Peonio". La peonio ĉarmis min tiel forte, ke mi ne volis ĝin forlasi. Mi senĉese admiris la altan arton de la florkultivisto, kiu sukcesis krei tiun mirindan varion per grefado.

Ĉi-jare la tieaj peonioj kreskas aparte bone. Tien venis brodistoj, flordesignistoj, metiartistoj, belartistoj, hortikulturistoj, sciencistoj, pentristoj, verkistoj, kaligrafoj, raportistoj, fotografistoj el diversaj lokoj de Ĉinio kaj eksterlandanoj por ĝui kaj pentri florojn, verki poemon kaj fari intervjuon, esploron kaj observon.

Akompanate de Ĝaŭ, mi rigardis la novajn variojn kultivitajn de ili. Tie ĉarmis diversvariaj peonioj. La altaj peonioj kun blankaj floroj impresis kiel neĝa turo en malproksimo. Iuj prosperis kun korolo en 27-centimetra diametro, aliaj ridis al la suno kun grandaj ruĝaj petaloj, triaj rekte staris kun verdaj folioj, blankaj floroj kaj verda stameno. La verdaj petaloj formitaj de ovario okulfrape elstaris interne de la floroj. Florkultivistoj kaj profesoroj de la Ŝandong-a Agronomia Instituto donis al la peonioj figurajn kaj poeziajn nomojn laŭ iliaj formoj.

Jam de la antikveco oni deziras, ke la floroj floru laŭ la homa volo. Sed fakte la floroj havas sian floradan periodon. La peonioj floras ĉ. 20 tagojn ĉiujare. Oni povis nur vesperi pro la manko. Laŭdire, la imperiestrino U Zetjan de Tang-dinastio ordonis ĉiujn florojn flori en frosta vintro. La floroj obeis ŝian ordonon, escepte de la peonioj, kiuj do estis elpelitaj de Ĉang'an al Lŭojang. Nun la florkultivistoj de Heze donis taŭgajn temperaturon kaj humidecon al la peonioj laŭ ilia kreska leĝo. Dank' al tio la peonioj kultivi-

vitaj de ili jam povas antaŭtempe flori. En marto 1985, kiam oni okazigis ekspozicion de kaligrafoj kaj pentraĵoj pri peonioj de Ĉaŭĝoŭ en la Ĉina Beiarata Domo en Pekino, la vintra malvarmo ankoraŭ atakas kaj la lokaj floroj ne burĝonis. Tamen 200 potoj da peonioj transportitaj el Heze disfloris en la eksponejo, kio tre ĝuigis la rigardantojn.

Antaŭ la forlaso de la vilaĝo Ĝaŭloŭ, alia fakulo diris al mi, ke ĉiujare oni vendas pli ol 40 000 peoniojn al ĉinoj kaj eksterlandanoj. Krome oni uzas peonion por receptoj: ĝia radiko kuracas febron, fortigas la sangon, forigas purpuraon, mortigas bakteriojn kaj malaltigas sango-premon. El peonio oni ankaŭ faras vinon. En vinfarado oni uzas ĉefe la peonion Ĝaŭfen, varion ĉarman kaj aroman kaj tie kultivatan. La Peonia Vino de Heze produktita de la Heze-a Vinfarejo estas bonodora, bongusta kaj tre bonvena al klientoj.

Peonioj en florado



KURANTAJ AFEROJ

VESTOJ — LA DUA GRANDA EKSPORTAJO DE ĈINIO

En la lastaj jaroj la eksporta sumo de vestoj de Ĉinio kreskis meznombro je 11% ĉiujare. Oni turnis sian atenton ĉefe sur kvaliton de la vestoj, sed ne sur grandigon de ilia kvanto. La totala sumo de eksportado de vestoj en la pasinta jaro estis 1.02 miliardoj da usonaj dolaroj kaj tiu de la unuaj kvin monatoj ĉijare atingis 550 milionojn da usonaj dolaroj. Kaj tiel vestoj jam fariĝis la dua granda eksportaĵo de Ĉinio nur post tiu de nafto.

Nun ĉinaj konfekcioj vendiĝas en pli ol 130 landoj kaj regionoj. Inter alie 70% de la konfekcioj vendiĝas en Usono, Kanado kaj la merkato de la Eŭropa Ekonomia Komunumo. Iuspecaj konfekcioj povas rivali kun la fammarkaj vestoj de aliaj landoj kaj la triono de la ĉinaj eksportaj konfekcioj viciĝas inter la multekostaj varoj en internacia merkato.

ĈEFAJ LABORATORIOJ EN INTENSA KONSTRUADO

Por altigi la scienc-eksperimentan nivelon, akceli interfakan penetriĝon kaj sin prepari por plua disvolvo de sciencoj kaj tekniko, en la Sesa Jarkvino (1981-1985) pri la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo de Ĉinio oni decidis konstrui 20 ĉefajn laboratoriojn. Iuj el ili jam estis antaŭtempe finkonstruitaj kaj ekfunkciis kaj la granda parto de ili estas en intensa konstruado laŭ la difinita plano.

Konstruado de ĉefaj laboratorioj estas grava konsistiga parto de la scienc-teknika plano de Ĉinio. Ĝi servas ĉefe al la fundamenta esplorado kaj parto de aplika studado kaj estas ankaŭ ekirpunkto de la disvolviĝo de altklasaj teknikoj. De 1986 ĝis 1990 Ĉinio konstruos aliajn 50 ĉefajn laboratoriojn.

100 MALGRANDAJ KEMISTERKAJ FABRIKOJ REFORMATAJ

Ĉinio decidis reformi nombron da malgrandaj kemisterkaj fabrikoj, reordigi la produktaĵan strukturon kaj kreskigi la produktojn de ureo, fosfor-amonio.

Laŭ la plano de la reformo en 1986-1990 la ŝtato kaj lokaj departementoj elspozos po miliardon da ĵuanoj. Per la monprunto oni reformos 100 malgrandajn kemisterkajn fabrikojn en 50 kompletojn da ekipaĵoj, kiuj ĉiujare povos produkti 2 milionojn da tunoj da ureo, kaj samnombrajn ekipaĵojn, kiuj ĉiujare povos produkti 1.5 milionojn da tunoj da fosfor-amonio.

FLOSEKSPEDICIO SUR JANGZI-RIVERO

La 16-an de junio la sciencspora flosekspedicio de Jangzi-rivero el pli ol 40 bravuloj ekveturis de la rivero Tŭotŭo, de kie komenciĝis la fluo de Jangzi-rivero, kaj komencis sciencan esploradon pri mistero de la rivero. La 6 300-kilometra Jangzi-rivero estas nekongerita rivero de la mondo. En 1985 Jaŭ Maŭŝu de la Sudokcidenta Ĝjaŭtong-universitato sola faris flosekspedicion laŭ la fluo de Jangzi-rivero kaj viktimiĝis en katastrofo. Por efektiviĝi lian volon la Ĉengdu-a Filio de la Ĉina


Akademio de Sciencoj decidis organizi sciencsporan flosekspedicion al Jangzi-rivero. Oni elektis pli ol 40 bravulojn el la volontuloj de pli ol 20 provincoj kaj municipoj de Ĉinio. Post rigora trejnadado kaj bona preparado en la unua tagdeko de junio la ekspedicio ekmarŝis al la supra fonto de Jangzi-rivero. Dum flosado la ekspedicio faros esploradon pri la natura medio de la fontoregiono de la rivero.

PEKINAJ KATOLIKOJ PREĜAS POR LA MONDPACO

La 8-an de junio en Pekino miloj da katolikoj faris preĝon por la mondpaco en la Katolika Katedralo, de Ŝjiŝiku.

1986 estas Internacia Jaro de Paco. Aprile la ĉinaj religiaj rondoj iniciatis solenan preĝon por paco en diversaj preĝejoj tra la lando. Responde al la iniciato la pekina diocezo de katolikismo okazigis la aktivadon.

La aktivado estis farita sub la aŭspicioj de la Nacia Administra Komisiono de la Ĉina Katolika Eklezio, la Ĉina Katolika Episkopa Kolegio kaj la Pekina Diocezo de la Ĉina Katolika Eklezio. Zong Hŭajde, prezidanto de la Ĉina Patriota Katolika Asocio kaj episkopo de la Ĝĵinan-a diocezo,




Pekinaj katolikoj preĝas por la mondpaco.

La arto de lanterno

Orita kupra lanterno kun homfiguro, farita en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 24 p. K.)






Ili faras diverskolorajn lanternojn.

Dumlonge la ĉinoj uzis lanternon por lumigado. En diversaj tempoj ili faris bronzan lanternon, jadan lanternon, oritan kupran lanternon, porcelanan lanternon kaj palacan lanternon, kiuj estas belaj artaĵoj modestaj aŭ luksaj en formo de homo, birdo aŭ besto.

Lanterno servas ne nur kiel lumilo, sed ankaŭ ornamaĵo en la popola vivo. Jam antaŭ 1000 jaroj en diversaj lokoj de Ĉinio okazis lanterna festo, oni prezentis milojn da buntaj lanternoj por ĝuo. Tiun moron oni ankoraŭ konservas hodiaŭ.

Jada lanterno kun desegnaĵo, farita en 475-221 a. K.



Bronza lanterno en formo de birdo, farita en 206 a.K. — 24 p.K.



*Bronza lanterno tenata de
homo sur kamelo, farita
en 475-221 a.K.*

*Moderna kolora
lanterno*

iaŭ kiel
10 jaroj
en kiu
novjara
iaŭ.





Ujuroj en Korban-festo

Tradiciaj festoj de ĉinaj nacimalplimulto

de LI ĈJANG

Ji-oj en la Torĉa Festo



En Ĉinio estas ne nur tradiciaj festoj komunaj al la diversaj naciecoj, sed ankaŭ tiuj propraj al ĉiu el la 55 nacimalplimulto, iom post iom formiĝintaj en la longa historia evoluo. Okazas, ke eĉ unu nacimalplimulto kun malsamaj branĉoj kaj en malsamaj regionoj havas malsamajn festojn, kaj ke eĉ unu festo portas malsamajn enhavojn. Tio ebligas al la festoj de la ĉinaj nacimalplimulto havi densajn lokajn karakterizaĵojn kaj originalajn naciecajn kolorojn.

La multnombraj karakterizaj festoj jam fariĝis parto de la nacimalplimultaj moroj. Iuj festoj portas econ de primitiva totemo aŭ religian koloron, sed plejparto de ili estas ligita kun aktivadoj kultura kaj sporta kaj kun varo-interŝanĝo kaj posedas riĉan enhavon.

Nadamu-festivalo estas tradicia festo de la mongoloj. Ĉiun aŭtunon, kiam grasas la herboj, bovoj kaj ŝafoj, la feste vestitaj mongoloj kolektiĝas sur la Stepo

de la Interna Mongolio. En la festivalo estas ne nur sago-pafado, ĉeval-vetkuro kaj luktado, sed ankaŭ atletiko, piedpilkado kaj prezentado de artaj programoj. La vendobudoj en la ĉirkaŭaĵo tre viglas en interŝanĝo de varoj.


La Novjara Tago laŭ la tibeta kalendaro estas la plej solena por la tibetanoj. Jam de la unuaj tagoj de la 12-a monato laŭ la tibeta kalendaro oni faras preparojn por ĝi. Antaŭvespere de la Novjara Tago ĉiuj familianoj sidas ĉirkaŭ tablo. Kun granda ĝojo ili trinkas sekalvinon kaj buteran teon. En la Novjara Tago la loĝantoj feste intersalutas kaj donacas blankan silkan rubandon reciproke. Ili prezentas tibetajn teatraĵojn kaj la dancojn *gŭoĝŭang* kaj *ŝjanzi*. La tibetaj paŝtistoj kantas kaj dancas ĉe kampfajro ĝis la sekvanta mateno.

Ankaŭ Ŭanggŭo-festo kaj Ban-festo en aŭtuno estas tradiciaj por la tibetanoj (pri detaloj legu

du antaŭlastajn alineojn sur p. 52, 4-a numero, 1986). Kaj membroj de la tibeta nacieco en aliaj lokoj havas siajn proprajn festojn. Ekz., tiuj en parto de Ĝone-gubernio, Gansu-provinco, festas Manla-feston, kiu daŭras de la 8-a ĝis la 15-a de la unua monato laŭ la luna kalendaro, kaj en la festotago la edziniĝintaj virinoj revenas al sia gepatra hejmo por festi kune kun siaj parencoj kaj distriĝi per kantoj kaj dancoj; tiuj en Gannan, Gansu-provinco, festas sian Ŝjanglang-feston sur stepo kaj en arbaro de la 4-a ĝis la 17-a de la sesa monato laŭ la luna kalendaro, kaj en la festo ili starigas tendojn kaj buĉas bovojn kaj ŝafojn; kaj tiuj en Ŭenŝjan-gubernio, Gansu-provinco, festas en la bela kvina monato laŭ la luna kalendaro la Flor-plukan Feston, la Filinan Feston de tieaj tibetanoj.

Ĉe la mjaŭ-oj estas la Drakboata Festo kaj la festoj Luŝeng, Ĉiŝin, Tjaŭpo, Hŭaŝan k.a. El ili iuj estas komunaj al la mjaŭ-oj,

Li-oj festas la Kantadon de la Tria de Marto.





Gaja festo de mjaŭ-oj

ŝeng-oj (blovinstrumentoj), ludas flutojn kaj aranĝas taŭrbatalon kaj ĉevalvetkuron. La 8-a de kvara monato laŭ la luna kalendaro estas alia festo de la mjaŭ-oj. En tiu tago la mjaŭ-oj en la ĉirkaŭaĵo de Gujjang, la ĉefurbo de Gujĝoŭ-provinco, venas al Fontano en la urbocentro por honori la memoron al sianacia heroo en la historio. Tiutage ĉiuj familioj trinkas rizvinon kaj manĝas kolorigitan gluecan rizaĵon karmemore al sianaciaj herooj.

Ankaŭ al la dung-oj ne mankas festoj, el kiuj la plej altira estas la Festo de Taŭrbatalo. Ĉiu dung-a vilaĝo bredas unu fortan lukteman taŭron. En la festotago la taŭrbatalejo ornamita per koloraj flagoj estas plenplena de rigardantoj. Oni tamtamas, gongas kaj ludas luŝeng-ojn. Ĉies atenton kaptas la taŭroj el la diversaj vilaĝoj, kovritaj per ruĝa sateno sur la kapo kaj portantaj buntan pagodon kun flago kaj fazanvosto sur la dorso kaj arĝentajn sonoriletojn sur la kolo. Ili obstine batalas kaj sentigas al la rigardantoj streĉan kaj gajan etoson.



Taj-oj en la Akvoverŝa Festo

La Torĉa Festo estas tradicie festata de la ji-oj, baj-oj, va-oj, lahu-oj, aĉang-oj, lisu-oj kaj hani-oj, kiuj vivas en sudokcidenta Ĉinio. La festo daŭras de la 24-a ĝis la 25-a de junio laŭ la luna kalendaro. Nokte de la festotago, en ĉiuj vilaĝoj staras altaj torĉaj iluminaĵoj. Kun malgrandaj rezinaj torĉoj festantoj marŝas sur kamp-vojoj, de vilaĝo al vilaĝo. Al ili aliĝas pli kaj pli da homoj, kaj la vicaro fariĝas kvazaŭ fajra drako. Junuloj aldonas al la fajro rezinon kaj pulvon kaj petolas de tempo al tempo. En iuj lokoj oni okazigas foiron samtempe, por faciligi la loĝantojn interŝanĝi varojn kaj

aliaj apartenas al tiu aŭ alia branĉo el ili kaj triaj al kelkaj vilaĝetoj sur monto. Estas interese, ke tiuj festoj ĝenerale rilatas al kortuŝaj rakontoj, kiuj aldonis al ili ian legendan koloron.

La mjaŭ-oj havas sian propran tradician Novjaran Feston por festi riĉan rikolton, preĝi por favoraj vento kaj pluvo kaj esperi abundecon de grenoj kaj brutoj. La festo daŭras tri tagojn, en kiuj la mjaŭ-oj dancas kun lu-

“Libro de Poezio”, la unua kolekto de poemoj de Ĉinio

de MEJ ĜI

Kiam aperis la plej fruaj poemoj de Ĉinio? Kiel popola buŝa literaturo, poemoj aperis en la sama tempo de antikvaj mitoj. La skribitaj poemoj naskiĝis en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno antaŭ 2 500 jaroj, en formo de libro. Tio estas “Libro de Poezio”.

En la ĉina historio, de la komenco de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio, t.e. en la 11-a jc. a.K., ĝis la mezo de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno en la 6-a jc. a.K. estis sklava socio. La 305 poemoj en la poem-kolekto ja estis verkoj en la 500 jaroj de tiu periodo.

La kolekto formiĝis en la sesa jc. a.K. Unue ĝi portis la titolon “Poemoj” aŭ “Tricent Poemoj”. Pro tio, ke la pensulo, politikisto kaj edukisto Konfuceo en la postaj jaroj de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj la

eklektikistoj adorantaj Konfuceanisman, precipe homoj de post Han-dinastio, alte taksis klerigadon per poezio, la “Poemoj” estis prenita kiel klasika lernolibro, kaj alinomita “Libro de Poezio”.

Pri la procedo de la kompilado de la “Libro de Poezio” estis malsamaj konjektoj. Laŭ la kompletco kaj riĉeco de la enhavo, la aranĝo de ritmoj de la poemoj kaj la vasteco de la devenlokoj de la poemoj, oni asertis, ke la apero de la kolekto estus neebila sen intencaj kaj zorgaj kolektado kaj ordigado, en la socio kun malfacila trafikaĉado kaj multaj enigmaj dialektoj. La poemoj en la kolekto estas kanteblaj tekstoj zorgataj de korteganoj pri muziko de Ĝoŭ-dinastio. Konjekteble, ke la kompilintoj de la “Libro de Poezio” estis tiaj korteganoj,

kiuj kunigis la versaĵojn omaĝitajn de muzikistoj de dependaj regnoj de Ĝoŭ-reĝlando kaj polkantojn kaj prezentis ilin al la kortego.

La “Libro de Poezio” dividiĝis en tri partojn: *Gŭofeng* (lokkoloraj), *Ja* (atikaj) kaj *Song* (prikantaj).

“*Ja*” estis titoloj de melodioj. Ĝi entenas du partojn: “granda *Ja*” kaj “malgranda *Ja*”. “*Ja*” nombras 105 poemojn aperintajn kompare frue, verkitajn de la kortego de Ĝoŭ-reĝlando. La poemoj estis prezentitaj ĉe kortega kunveno kaj festeno, kaj plejparte estis prikanto al la regado de la reĝo kaj bonfaroj de la forpasintaj reĝoj.

“*Song*” entenas kvardek himnojn kaj kantojn por rito. La himnoj estis dividitaj en tri

tiel vigligi la urban kaj vilaĝan ekonomion.

La taj-oj havas multajn aktivadojn en sia Novjara Tago. Ili kantas kaj dancas por montrisian ĝojon, amasigas sablon por preĝi pri riĉa rikolto, ĵetas sake-ton por peti amon, verŝas akvon por esprimi bondezirojn kaj krome ankaŭ okazigas drakboatan

konkurson. El ili la reciproka akvoverŝado estas la plej spektakloriĉa, kaj oni nomas ĝin la Akvoverŝa Festo.

Krome, estas tradiciaj ankaŭ la Marĉa Foiro kaj Jaŭŝanlin de la baj-oj, Danu-festo de la jaŭ-oj, la Kantado en la Tria de Marto de la ĝuang-oj kaj li-oj, Niŭŭang-festo de la tuĝa-oj, Dŭan-festo

de la ŝuj-oj, Njan-festo de la lŭoba-oj, Bangbang-festivalo de la naŝi-oj, Daŭgan-festo de la lisu-oj kaj Munaŭ-festivalo de la ĝingpo-oj. Kaj la huj-oj, uĝuroj kaj aliaj ok nacimalplimulto kredantaj je islamo havas la Fasto-rompan Feston, Korban-feston kaj aliajn religiajn festojn kiel sianaciajn festojn.

grupojn: Himnoj de Ĝoŭ, himnoj de Lu kaj himnoj de Ŝang. La himnoj de Ĝoŭ estis verkitaj en la komenco de Ĝoŭ-dinastio. La himnoj de Lu kaj Ŝang estis verkoj de la regnoj Lu kaj Song en la 7-8-a jc. a.K.

Valoraj estas la historiaj epopeoj en "Ja" kaj "Song". Ekzemple, "Naskiĝo de Hoŭĝji", "Gongliŭ" kaj "Senĉesa Prosperiĝo" en "Granda Ja" notis multajn legendojn kaj historiajn faktojn. "Gongliŭ" kaj "Senĉesa Prosperiĝo" priskribis la grandskalajn transloĝiĝojn de la nacio, la terkulturadon kaj domkonstruadon de la antikvaj popoloj. En "Gongliŭ" estas tiaj versoj: "Ĉirkaŭe de la ĉefurbo la popoloj ekhavis domojn, la migrantoj ĉesis vagadi, kaj ĉie leviĝas ĝojo kaj rido." "Senĉesa Prosperiĝo" priskribas streĉan laboron en konstruado de muroj. Tiuj versoj estas gravaj materialoj por esplori la antikvan socion de Ĉinio.

La plej brila parto en la "Libro de Poezio" estas *Gŭofeng*, en kiu estis kolektitaj lokaj poemoj de 15 regnoj, verkitaj en la tempo de la komencō ĝis

la mezo de la Periodo de Prin-tempo kaj Aŭtuno.


La poemoj en *Gŭofeng* ampleksas diversajn temojn:

PRI AMO. Granda parto de la poemoj en *Gŭofeng* temas pri amo kaj edzeco. Tiaj poemoj "venis de la popolo en formo de popolkanto, kantata de gejunuloj en esprimo de ilia korinklino". "Ĉe la riveroj Ĝen kaj Ŭej" bildigas gajan ekskurson de gejunuloj en printempo ĉe la riveroj Ĝen kaj Ŭej. "Ĉarma knabino", "Cidonio" kaj "Falin-taj folioj" spegulas harmonion kaj ĝojon inter la geamantoj. En la versaĵoj oni vidas puran koron kaj seren an humoron de la antikva popolo. "Ruza Fraŭlo" priskribas aflikton de knabino, kaj "Levu vian baskon" ŝercon inter la geamantoj. Ilia sentoesprimo estis senkaŝa, kuraĝa kaj senĝena. "Morta alko sur kampo" estas ampoemo kun pura primitiva koloro. "Morta alko sur kampo kovriĝis de herboj, knabinon en afrodizio tentas fraŭlo. . . Ne pasiĝu nek urĝiĝu, mian antaŭtukon ne tuŝu, kaj vian hundon silentigu." La fraŭlo en la poemo estis

ĉasisto. Ĉasante en arbaro, li renkontis belulinon kaj gajnis ŝian koron. Ilia enamiĝo estis tute natura kaj libera. "La malvirtulo" estas korverŝo de forlasita virino. La heroino en la poemo sincere strebis al pura amo kaj feliĉo. Sed 3 jarojn post la geedziĝo ŝi estis forlasita de la edzo. Ŝi ĉagreniĝis, malamis kaj indigne riproĉis la malvirton de la edzo. Ŝi larme akuzis la malegalecon inter la seksoj: "Ho ve, knabinoj, ne tro pasiĝu kun fraŭloj, ili facile forĵetos la amatinon, dum virinoj restos sen libero." Fine ŝi firmdecide foriris de sia edzo.

PRI OPONO KONTRAŬ EKSPLUATO KAJ SUBPREMO. "Malsatuloj arias pri malsateco, laboruloj pri sia okupo", jen la esenco de multaj poemoj en la "Libro de Poezio". En "Otidō" oni tiel plendis: "Pro la senfina servutado al la kortego, ni ne havas tempon por nia agro, nek por zorgi pri la gepatroj. Ho ĉielo, kiam ni povus ĝui pacan vivon?" "Kampomuso" indigne mokis la aristokratojn diboĉantaj kaj esprimis deziron pri bona vivo. La poemo nomis la ekspluatantojn abomenindaj kampomusoj: "Musoj, musoj, mian grenon ne manĝu, mi vivtenis vin jam tri jarojn, tamen vi neniam konsideris por mi. Mi ĵuras foriri de vi kaj transloĝiĝos al paradizo. Paradizo estas loko destinita por mi."

PRI AGROKULTURO. El la "Libro de Poezio" estas poemo "La Sepa Monato" pri agrokulturo. Ĝi detale priskribas la kolektivan laboradon de agrikulturaj sklavoj de Ĝoŭ-dinastio. Krom terkulturo por aristokratoj, la sklavoj devis ankaŭ bredi silkraŭpojn, teksi ŝtofojn, fari vinon, ĉasi, kulti



kaj aranĝi celebradon por datreveno de naskiĝtago de aristokratoj. Kvankam ili laboradis tutan jaron, tamen ili havis nek vestojn nek grenon. En vintro por bari tranĉan venton, ili ŝtopis la fenestrojn kaj pordojn per pajlo kaj argilo. El la poemo ni povas trovi, ke tiam multe evoluis la agrokulturo de Ĉinio, riĉa estis la sperto de produktado kaj abundaj estis la produktajoj. "Plantago" estas kanto de virinoj dum kolektado de plantagoj. "Plantagoj kreskas surkampe, kaj ni ĝoje kolektas grupe. Ni serĉas, prenas sur la kampo kaj portas ilin hejmen en la vestoantaŭo." La lakona teksto ripetade, kantata de grupiĝintaj virinoj sur la kampo prezentas al ni belan scenon de laborado en serena tago.

PRI LA VIVO DE ARISTOKRATO. "Veturado" estas fama patriotisma poemo. Damo Ŝju-



Birda kanto

*Jen birda kanto tra l' aero
de insuleto en rivero.*

*Knabinon belan bonmoralan
'aspiras vir' kun amsincero.*

*Jen akvoherbojn longajn, kurtajn
maldekstre dekstre ŝi deŝiras.*

*La belulinon bonmoralan
en tag' kaj nokto li sopiras.*

*Li vane volas kaj deziras
kaj tage nokte ŝin sopiras.*

*Li sin turnadas sur la lito
kaj lia koro ne trankvilas.*

*Jen akvoherbojn longajn, kurtajn
en ambaŭ flankoj ŝi deŝiras.*

*La belulinon bonmoralan
per kordmuziko li altiras.*

*Jen akvoherbojn longajn, kurtajn
en ambaŭ flankoj ŝi deŝiras.*

*La belulinon bonmoralan
per gong-muziko li akiras.*

Cidonio

*Ŝi donis al mi cidonion,
mi rekompence jadornamon.*

*Ne nur por rekompenco —
esprimas ĝi eternan amon.*

*Donacis ŝi al mi persikon,
mi rekompence jardon ĉarman.*

*Ne nur por rekompenco —
esprimas ĝi eternan amon.*

*Ŝi donis al mi dolĉan prunon,
mi reciproke nigran jardon.*

*Ne nur por rekompenco —
esprimas ĝi ĉiam-amadon.*

Trad. Laŭlum

mu en la poemo deveninta de Ŭej-regno edziniĝis al Ŝjumu. Fronte al la disfalo de sia patrolando, ŝi sentis korŝiran doloron. Ŝi proponis peti helpon de Ŝjuregno, sed estis ĉikanita. Ŝi falis en grandan indignon kaj triston kaj verŝis sian senton pere de poemo. "Altstatura Belulino" priskribas ĉarmecon de damo Ĝuang Ĝjang, edzino de Ĝuang gong, estro de Ŭej-regno. "Onklo Ju Tjan" bildigas bravan militiston kaj liajn lertajn pafarton kaj veturigadon.


La "Libro de Poezio" ĝuas vastan renomon ne nur per sia riĉa enhavo, sed ankaŭ per brila poezia arto. La versoj de granda

parto de la poemoj estas kvar-ideografiaj, kaj ankaŭ enmik-siĝas du- kaj ok-ideografiaj. La lingvo de la poemoj estas rafinita, viveca kaj modesta. La poemoj ofte havas refreojn en peza popolkanta gusto. La saĝe uzata metaforo donas evidentan artan efikon. La verkin-toj de la poemoj ofte menciis iun objekton en la komenco kaj poste eltiras kion ili volis es-primi. En la poemo "Fragmitoj" la verkinto priskribis la sen-ivan aŭtunan scenon kaj poste eltiris la ĉefan enhavon de sia poemo, ke sentimentala fraŭlo falis en senhelpan aflikton pro sia fraŭleco. "Persikfloroj" komenciĝas per priskribo de dis-

volviĝantaj persikfloroj kaj poste priskribas la brilan ĉarmecon de tuj edziniĝonta knabino. Metaforo de la "Libro de Poezio" riĉigis la imagon, estas heredita kaj disvolvita en la postaj jaroj kaj fariĝis tradicia metodo de la poezio.

La "Libro de Poezio" estas atesto de la kreiveco de la laboranta popolo en la antikva Ĉinio kaj manifestiĝo de la sentoj de diversaj klasoj en reala vivo. La realismo de la "Libro de Poezio" fundamentis ĝian lokon en la historio de la ĉina literaturo kaj faris ĝin brila startpunkto kaj bazo de la ĉina realisma literaturo.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Suĝoŭ
2. Lingjŭan-gubernio
3. Heze-gubernio
4. Tibeta Aŭtonoma Regiono
5. Ŝjining
6. Ŝjian

LERNI LA FRANCAN LINGVON

(Humuraĵo)


Juna sinjorino: "En kiom da tempo mi povos ellerni la francan lingvon?"

Instruisto: "Tio dependos de via diligenteco. Sed pro kio vi urĝas vin ellerni ĝin?"

La sinjorino: "Mi adoptis duonjaran francan bebon. Se mi ne diligente lernus la francan lingvon, mi ne komprenus ĝin, kiam ĝi komencos paroli."

TESTO DE INTELIGENTECO

1. Nomburu, kiom da trianguloj, romboj kaj trapezoj troviĝas en la bildo.



(Solve trovebla en ĉi numero)

2. Mirinda solvo

Antaŭ tre longe vivis reĝo, kiu donis al sia kortegano malfacile plenumeban taskon. Li diris al la kortegano: "Morgaŭ pelu dumil ŝafojn al bazaro kaj vendu ilin. Vespere vi donu al mi la monon kaj ĉiujn ŝafojn senrezerve."

La kortegano ne kuraĝis malobei la ordonon de la reĝo, sed li vere ne sciis kion fari. Reveninte hejmen, li povis nek dormi nek sidi. Lia tre saĝa filino elpensis mirindan solvon por la patro.

Vespere de la sekva tago, la kortegano donis al la reĝo la monon kaj dumil ŝafojn. Kaj la reĝo povis diri nenion.

Konjektu, kian mirindan solvon elpensis lia filino.

(Solve trovebla en ĉi numero)

MONERO ESTAS FOR

(Eta magiaĵo)

Prezentado: Ludanto tenas moneron en la dekstra mano, montras ĝin al spektantoj, pugnigas la manon kaj denove etendas la fingrojn. Jen oni trovas, ke la monero jam malaperas.

Metodo: Volvi travideblan glupaperon ĉirkaŭ la pinton de la meza fingro (talki la paperon ĉe la haŭto de la supra parto de la

fingro kaj tiel senigi ĝian gluecon por garantii sukceson de prezentado). Kiam la ludanto pugnigas la manon, li algluas la moneron al la papero ĉe la mezfingra ungo. Kaj kiam li disvolvas la manplaton, la monero estas ĉe la dorsa flanko de la fingro kaj la spektantoj ne povas ĝin vidi.

ENIGMOJ

1. Sur la kapo kreskas du arboj, blankoj floroj vidiĝas sur la korpo.

Ĝi havas bonan humoron, kaj galopas ĝi kiel ĉevalo. Kiu besto ĝi estas?

(Solve trovebla en ĉi numero)

2. La flava globeto pleniĝas ene per kristalaj lunarkoj.

Manĝante ilin vi elkraĉas perlojn unu post alia. Kiu frukto ĝi estas?

(Solve trovebla en ĉi numero)

ELDONEJO GABRIELLI

Karaj geamikoj,

Laŭ la propono de mia edzo, s-ano Maksimilien Trenner, mia libroservo estis reorganizita.

Kelkaj eldonaĵoj jam elĉerpiĝis, sed estas ankaŭ aliaj kiuj atendas legantojn.

Pro tio mi vin petas mendi almenaŭ unu el ili. Petu la katalogon!

Se vi mendos en la daŭro de unu monato post lego de ĉi tiu reklamo, vi ne pagos la sendokostojn.

Kun mia korega saluto, via

d-rino Lina Trenner Gabrielli
166 avenue Daumesnil
F-75012 Paris 12
Telefono: (1) 343 37 68

Brila perspektivo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Latin-Ameriko

de KE DA'AN

Ĉinio komencis kontaktiĝi kun Latin-Ameriko jam en la mezo de la 16-a jarcento. Tiam, la hispanaj koloniistoj per Filipinoj transportis ĉinajn silkaĵojn, porcelanaĵojn kaj aromaĵojn al Acapulco de Meksikio, kaj de tie al aliaj lokoj de Latin-Ameriko por ilin vendi. Sed poste, dum longa tempo, pro malproksimeco kaj komplikaj internaciaj politikaj kaŭzoj, reduktiĝis la kontakto inter Ĉinio kaj Latin-Ameriko, tiel ke al ili mankis reciproka kompreno kaj ili eĉ fariĝis misteraj unu al la alia. Sed dank'al la disvolviĝo de la modernaj sciencoj kaj teknikoj, la geografia distanco ne povis plu malhelpi ilian kontaktiĝon. La ŝanĝiĝo de la internacia situacio, precipe la leviĝo de la tria mondo post la Dua Mondmilito, pli kaj pli intimigis la rilatojn inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj. Intensigi la kunlaboron kun la tria mondo estas la starpunkto de la sendependa kaj memstara diplomatia politiko de Ĉinio. La latin-amerikaj landoj estas grava konsistiga parto de la tria mondo, tial la disvolviĝo de la rilatoj inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj havas solidan politikan bazon.

Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, kelkajn periodojn trapasis la disvolviĝo de la rilatoj inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj. En la 50-aj kaj la 60-aj jaroj la kontakto de ambaŭ flankoj okazis ĉefe inter la popolanoj. Tiam, kvankam nur Kubo havis diplomatian rilaton kun Ĉinio de 1960, tamen multaj amikoj deziris koni la novan

Ĉinion kaj iuj el ili vizitis Ĉinion, venkinte malfacilojn. Por tio la Ĉina Asocio por Amikeco kun Latin-Ameriko, fondita en 1960, faris multajn laborojn. En la 70-aj jaroj, rapide disvolviĝis la rilatoj inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj. En 1971 Ĉinio denove havis sian leĝan sidlokon en UN, kaj la disvolviĝo de la naci-demokratia movado en Latin-Ameriko donis al ĝi pli da diplomatia sendependeco. Tial, de 1971 ĝis majo de 1976, Brazilo, Argentino, Meksikio, Peruo kaj aliaj 5 latin-amerikaj landoj establis diplomatian rilaton kun Ĉinio. Post 1976, precipe post 1982, kiam Ĉinio praktikis la politikon vigligi enlande la ekonomion kaj malfermi al eksterlando la pordon. La rilatoj inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj disvolviĝis en vasteco kaj profundeco kaj eniris la novan etapon plifirmigi la solidarecon kaj efike disvastigi la kunlaboron kaj interŝanĝon en ĉiuj kampoj. Multiĝis la reciprokaj vizitoj de ŝtataj gvidantoj de Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj, disvolviĝis la ekonomia kaj negoca rilatoj, oftigis kaj harmoniis ilia kunlaboro en la internaciaj aferoj.

Hodiaŭ Ĉinio havas diplomatian rilaton kun 17 latin-amerikaj landoj, kies teritorioj konsistigas 92% de la totala areo de Latin-Ameriko, kaj la loĝantoj konsistigas ĉ. 90% de la loĝantaro de Latin-Ameriko. Krome, preskaŭ ĉiuj latin-amerikaj landoj kaj regionoj havas negocan rilaton kun Ĉinio. Laŭ doganeja statistiko de Ĉinio, en 1984 la komerca spezo

de ambaŭ flankoj atingis 1.65 miliardojn da usonaj dolaroj, sed en 1950 ĝi estis nur 1 960 000 usonaj dolaroj.

Ĉinio, same kiel la latin-amerikaj landoj, apartenas al la tria mondo kaj troviĝas multaj komunaj interesoj inter ili. Ĉinio subtenas la nacidemokratian movadon de la tieaj popoloj en ĉiuj historiaj periodoj.

Mez-Ameriko jam fariĝis unu el la kontraŭdiro-koncentraj lokoj en la mondo. Ĉinio subtenas la interpacigon de Contadora-kliko inter la landoj de Mez-Ameriko, opiniante, ke en solvo de la problemoj de Mez-Ameriko oni devas kategorie oponi kontraŭ la interveno de la eksteraj fortoj; la internaj aferoj de la mez-amerikaj landoj devas esti solvitaj de iliaj popoloj, kaj la kontraŭdiroj inter tiuj landoj devas esti juste kaj racie solvitaj per paca traktado.

La ekstera ŝuldo grave malhelpas la prosperiĝon de la latin-amerikaj landoj. Ĉinio samopinias kun la latin-amerikaj landoj, ke tio estas ne nur ekonomia, sed ankaŭ politika problemo, oni devas mallevi la interezan procentaĵon de ĉiuj ŝuldoj, plibonigi la ŝuldkvitigajn kondiĉojn kaj nuligi la negocajn limigojn, por ke la ŝuldhavaj landoj disvolvu sian ekonomion kaj altigu sian debetpagan kapablon.

Krome, Ĉinio ĉiam subtenas la regionan unuigon de la latin-amerikaj landoj, fondon de sen-nuklea zono de Latin-Ameriko kaj akcelon de demokratiigo en la tieaj landoj.

*La ĉina ĉefministro
Ĝaŭ Zijang vizitas
Kordovon, Argentinon.*



En la estonteco multe disvolviĝos la rilatoj inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj kaj la nuna stato estas nekontentiga. Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj havas komunan intereson en defendo de la mondpaco, opono kontraŭ potenc-politiko, defendo de la nacia sendependeco kaj la ŝtata suvereneco ktp., tial ili devas plue plifirmigi la reciprokan subtenon kaj kunlaboron en la internacia politika vivo. Ili havas egalan nivelon en ekonomia disvolviĝo kaj teknikojn kun siaj karakteroj kaj posedas abundajn riĉfontojn, ĉio ĉi tio faciligas la interŝanĝon. Ankaŭ la spertoj en la ekonomia konstruado povas esti lernataj kaj lecionoj ĉerpitaj por ambaŭ flankoj. Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj ne nur deziras pluaparte disvolvi la politikan kaj ekonomian rilatojn, sed ankaŭ havas favorajn kondiĉojn por disvolvi la kunlaboron.

En la konkreta komerco kaj ekonomia kunlaboro, Ĉinio ĉiam

prenas egalrajtecon, reciprokan utilon, benefikon, variajn formojn kaj kunan disvolviĝon kiel sian principon.

La komerca spezo de la du flankoj nun estas tre malgranda, en 1984 ĝi konsistigis nur 3% kaj 1% de la totalaj komercaj spezoj de la du flankoj respektive. Ĉiflanke Ĉinio ĉiam faras sian penadon. Post kiam Brazilo komencis importi ĉinan petrolon en 1978, rapide kreskis komerca spezo de Ĉinio kaj Brazilo kaj en 1984 ĝi pliiĝis je 23% kompare kun tiu de 1983. La komerca spezo konsistigis 47% de la totala negoca sumo inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj tiujare.

La ĉina registaro alte taksas la disvolvon de la rilatoj inter Ĉinio kaj la latin-amerikaj landoj kaj la ĉinan popolon pli kaj pli interesas Latin-Ameriko. En majo de 1985, en la urbo Jantaj de Ŝandong-provinco, Ĉinio, fondiĝis la Instituto de Ĉinio kaj

Latin-Ameriko, landnivela populara akademia rondo, kiu studas problemojn de Latin-Ameriko. La Latin-Amerika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj publikigis multajn valorajn disertaĵojn pri problemoj de la latin-amerikaj landoj. Pli kaj pli multe da literaturaj verkoj, filmoj, dramoj, televidaj filmoj k.a. de Latin-Ameriko estas enkondukitaj en Ĉinion.

De la 28-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro en 1985, Ĝaŭ Zijang, ĉefministro de Ĉinio, faris oficialan amikan viziton en Kolombio, Brazilo, Argentino kaj Venezuelo en Sud-Ameriko por pliiĝi la reciprokan komprenon kaj amikecon, disvolvi kunlaboron kaj kune defendi la mondpacon. Tio estas granda afero en la historio de la rilatoj inter Ĉinio kaj Latin-Ameriko. Ĝi ne nur firmigis la rilatojn inter Ĉinio kaj la 4 sud-amerikaj landoj, sed ankaŭ akcelis la rilatojn inter Ĉinio kaj Latin-Ameriko.

**ĈINA 5-ANO SEIMIN
MEMBRIĜIS AL LA AKADEMIO
DE ESPERANTO**

Laŭ la propono de kvin akademianoj, la Akademio de Esperanto antaŭ nelonge balot-elektis s-ron Seimin, redaktoron de la Esperanta sekcio de Radio Pekino, kiel novan membron. Li estas la dua akademiano el Ĉinio (Li Ŝiĝjun la unua).



S-ro Seimin

**PEKINA ESPERANTO-ĤORO
PREMIITA**

La 3-an de junio la pli-ol-60-membra Pekina Esperanto-Ĥoro de la Pekina Esperanto-Asocio partoprenis en la Dua Pekina Ĥora Festivalo. La ĥoro prezentis la polan popolkanton "Knabino", la germanan popolkanton "Ranoj Kantas" k.a. kaj per tio ricevis aplaudon de la spektantoj. La Pekina Ĵurnalo tuj raportis pri la festivalo, aparte menciante la Esperanto-Ĥoron originalan en formo kaj stilo de prezentado. En la premiada ceremonio en la 6-a de junio la Esperanto-Ĥoro ricevis triagradan premion de postlabora prezentado. Ĝi estis unufoje premiita post sia fondiĝo en la 18-a de aprilo 1982.

**LA DISERTACIO "ĈE
JAŬŜJAN KAJ ESPERANTO"
PREMIITA**

La Ĉengdu-a Esperanto-Asocio en Siĉŭan-provinco, Ĉinio, kuraĝigas siajn membrojn fari Esperantajn tradukojn kaj verki disertaciojn pri Esp-movado. Ĝia membro Ĝang Ŝaŭĉeng per sia disertacio "Ĉe Jaŭŝjan kaj Esperanto" gajnis triagradan premion en la konkurso pri tradukoj kaj disertacioj de 1984 ĝis 1985 okazigita de la Tradukista Asocio de Siĉŭan. Ĉe Jaŭŝjan, eminenta ĉina revoluciulo kaj simpatianto de Esp-movado, aktivis en Siĉŭan-provinco kaj viktimiĝis en la 40-aj jaroj.

**NOVA E-KLUBO EN
KOLOMBIO**

Fondiĝis "PEREIRO-ESPERANTO KLUBO" kun la celo disvastigi Esperanton per prelegoj, radioelsendoj, instruado kaj kontaktoj.

Kuraĝigaj salutesprimoj estas bonvenaj. "PEK" A.A. 2965 Pereira, Kolombio.

Membroj de "Esperanto Mayo Klubo" de Kolombio



**LA 30-A INTERNACIA
SEMINARIO**

La Internacia Seminario jam de kelkaj jaroj estas komuna aranĝo de GEA kaj GEJ kaj de tiam turnas sin ne nur al junuloj sed ankaŭ al mezaĝuloj. En la lastaj jaroj kutime partoprenis ĉ. 200 personoj el 15-20 landoj. Ĉi-jare ĝi okazos inter la 27-a de decembro kaj la 3-a de januaro 1987 en Köln (Kolonjo), FRG. Detalajn informojn petu de Thomos Pusch, Am Schwertberge 23 D-2845 Damme.

**ALVOKO DE NASKIĜLOKO
DE ZAMENĤOF**

Okaze de la 100-jara naskiĝdatreveno de Esperanto Vojevodia Filio en Bialistoko organizas la ekspoziciojn kaj informkunvenojn dum 07-08, 1987. Tiu-cele ili petas sendaĵojn rilatajn al Esperanto. Bialistoko estas naskiĝloko de nia kara majstro. Ĝin vizitos venontjare multaj esperantistoj. Adreso: Polski Zwazek Esperant-ystow, Oddzial Wojewodzki, WBialymstoku ul. Lipowa 14, 15-001 Bialystok 1, skr. poczt, 67.

KONGRESOJ EN LA JUBILEA JARO

Britio La loka kongresa komitato sciigas vin afable, ke 17-20 de aprilo, 1987 okazos en Abergavenny en Suda Kimrujo, Britio, la Jubilea Brita Esperanto-Kongreso por la 100-jara datreveno de la kreiĝo de Esperanto.

Venezuelo Inter la 11-a kaj la 19-a de oktobro 1987, la Venezuela Esperanto-Asocio festos la Jubilean Jaron de Esperanto per Internacia Festivalo pri turismo, komunikado kaj kulturo.

Jugoslavio La 22-a Kongreso de Jugoslavia Esperanto-Ligo okazos en la jubilea jaro 1987 en Banjaluka de 19-21, junio. La kongreso estas la plej grava labora kunveno de jugoslavia E-movado okazanta ĉiun kvaran jaron.

ELDONAĴOJ POR LA JUBILEA JARO

Gluetikedoj Esperanto 1887-1987: orkolore presitaj, uzablaj sur korespondaĵoj. Prezo de 100 gluetikedoj: 200 BF.



Esperanto-ekspozicio en granda parko en Perth, okcidenta Aŭstralio

Sunŝirmilo Esperanto 1887-1987: blanka preso sur verda fono. 10 × 130cm. (por aŭto). Prezo: 250 BF.

Ŝlosilingo Esperanto 1887-1987: en diversaj koloroj: blua, flava, blanka, verda kaj ruĝa. Prezo: 100 BF.

La sendokostoj estas en la prezoj inkluzivitaj. Bonvolu pagi al poŝtgira konto: Bruselo, 000-0152140-44 de Eldonejo kaj Libroj Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 EILRIJK, Belgio.

Poŝtkarto: eldonata de G.A.E., 123, rue de Royan, F-16710 Saint-yrieix, franclingve kaj Esperante. Estas konsentata nacilingva reproduktado de tiu temo (Centjara Jubileo de Esperanto) en ĉiuj landoj. G.A.E. nur petas, ke ĉiu lando bonvolu, eventuale, sendi 2-3 specimenojn de siaj eldonaĵoj al G.A.E. por muzeo.

Specimenoj de tiu poŝtkarto estas haveblaj kontraŭ 2-3 internaciaj respondkuponoj.

Poŝtkarto el Francio



Solvoj:

1. "Nombro": 64 trianguloj, 18 romboj kaj 54 trapezoj.
2. "Mirinda solvo": La kortegano forvendis la detonditan ŝaf-lanon kaj donis al la reĝo la monon kaj dumil ŝafojn.
3. "Enigmoj": 1. cervo 2. oranĝo

Esperantaj Libroj

Literaturaj verkoj:

Kanto de Juneco (romano)	312pĝ.	£1,90	US\$3,90	10-Es-605P
Noveloj de Lusin (noveloj)	532pĝ.	£2,80	US\$4,80	10-Es-1290S
Aŭtuno en la Printempo (novelo)	116pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1525
El Ĉina Poezio (poemoj)	166pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1526
Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang (eposo)	58pĝ.	£1,55	US\$2,85	10-Es-71S
Montara Vilaĝo (romano)	272pĝ.	£3,85	US\$7,80	10-Es-1882S
Bronza Tigro (dramo)	138pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1954S
Verkoj de Verda Majo	510pĝ.	£4,20	US\$8,50	10-Es-1653S
Bukedo al Vi (mikronoveloj)	96pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1881P

Popolaj rakontoj:

Rakontoj pri Afanti	78pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1578PA
Saĝo-sako	78pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1778P
La Feliĉa Birdo	56pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1866P
Papilia Fonto	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1883P
Magia Ŝipo	76pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1623PA

Feniksa libraro:

40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio	272pĝ.	£1,90	US\$3,90	12-Es-1825P
Dek Ses Urboj de Ĉinio	176pĝ.	£1,90	US\$3,90	17-Es-1885P
Mia Vivo	128pĝ.	£0,80	US\$1,70	17-Es-1884P
Pitoreska Pekino	74pĝ.	£0,95	US\$2,00	17-Es-1827P
Albumo pri Ĉinio	98pĝ.	£1,90	US\$3,90	85-Es-175P

Infanlibroj:

Kolorigu	120pĝ.	£2,90	US\$5,90	88-Es-205P
Bonkora Ŝjaudon	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-204P
Brava Kolombido	20pĝ.	£6,65	US\$1,30	88-Es-244P
Petolema Kaprido	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-241P
Lutro kaj Bufo	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-242P
Kokido Venĝis Sian panjon	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-246P
Du Katetoj	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-243P
Senmortigaj Fruktoj	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-194P
Plau! Plau!	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-201P
En la Bestoĝardeno	80pĝ.	£1,30	US\$2,60	88-Es-174P
Magia Peniko	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-178P
Anaseto kaj Koketo	28pĝ.	£0,35	US\$0,70	88-Es-176P
Ora Hakilo	32pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-195P
Kiel Kovi	28pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-196P
Malatentema Virino	24pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-197P
Vostkonkurso	16pĝ.	£0,30	US\$0,65	88-Es-200P
Konstrui Novan Ponton	40pĝ.	£0,22	US\$0,40	88-Es-156P
La Fiera Multkolora Kateto	44pĝ.	£0,95	US\$2,00	88-Es-154P

Mapo de la Ĉina Popola Respubliko £0,50 US\$0,95 12-Es-176P

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**

Perantoj de EPC

aŭ **Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHU-
DIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

Alpismo en la monta regno

de LU GŬOJŬAN

Komence de 1986, por konduki eksterlandajn alpistojn en Tibeton, Ĉilje Langĝje, estro de la Sporta Servo de Tibeto, vizitis Nepalon, Francion kaj Italion. Tamen antaŭ ol finiĝis la vojaĝo, li haste revenis al Lhasa — li devis ŝanĝi sian planon pri akcepto de la eksterlandaj alpistoj, ĉar tro multe da eksterlandanoj esprimis sian deziron fari alpismojn kaj turismon sur la tegmento de la mondo, kio multe superis la akceptan povon de Tibeto en la nuna tempo. Laŭ statistiko, en 1985 Tibeto akceptis pli ol 50 alpistajn grupojn, sed ĝis la fino de aprilo de 1986 pli ol


100 eksterlandaj societoj petis fari alpismojn kaj turismon en Tibeto.

Depost kiam la Eŭrop-Azia Kontinenta Plato koliziis kun la Hinda Subkontinenta Plato, malaperis la maro Tethys kaj leviĝis la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo. Tibeto ĉiam estas mistera loko por la tuta mondo. Ĝi estas altebenaĵo la plej granda kaj plej alta super la marnivelo, kaj tie kontinuas la montoj, arbare staras altaj montpintoj. Ĝi estas vera monta regno, aparte alloga kaj aspirata. Sur la vasta altebenaĵo de norda Tibeto

kuŝas la grandioza montaro Kunlun kaj ĝiaj branĉoj Altun, Kekeŝjili kaj Tanggula, ĉiu kun meznombra alteco de ĉ. 6 000 m. super la marnivelo. La impona montaro Gangardesi kun meznombra alteco de pli ol 5 500 m. super la marnivelo kuŝas meze de Tibeto kaj dividis ĝin en du partojn de oriento okcidenten. La majesta Himalajo 2 400 km. longa kaj 200-300 km. larĝa estas la plej longa monto en la mondo. Ĝia meznombra alteco superas 6 000 m. super la marnivelo. En la tri grandaj montaroj staras multaj mondfamaj

Comolangma





Kampadejo de alpistoj

montpintoj. El la 14 plej altaj montpintoj pli ol 8 000 metrojn super la marnivelo de la mondo 5 lokiĝas tie. Ili estas Ĉomolangma (la ĉefa montpinto de Himalajo), 8 848 m. super la marnivelo, nomata la kresto de la tero kaj la tria poluso de la mondo; la kvara alta montpinto Lūozi, 8501 m. super la marnivelo; la kvina alta montpinto Makalu, 8 410 m. super la marnivelo; la sesa alta montpinto Zūoaŭjoŭ kaj la 14-a alta montpinto Ŝjiŝabangma 8 012 m. super la marnivelo. Cetere, en la mondo estas proksimume 300 montpintoj 7 000 m.

super la marnivelo kaj el ili pli ol 40 situas en Tibeto aŭ ĉe ĝiaj regionlimoj. Estas des pli granda la nombro de la montpintoj 6 000 m. super la marnivelo.

La loĝantoj, vivantaj generacion post generacio en Tibeto, ĉiam paŝtas, ĉasas, prospektoras kaj kolektas drogherbojn sur la montoj 5 000-6 000 m. super la marnivelo. Tamen katenite de la longdaŭra servuta sistemo, la moderna alpismo disvolviĝis en Tibeto nur komence de la 60-aj jaroj. La 25-an de majo, 1960, tri ĉinaj alpistoj,

inkl. de tibeta alpisto Gonpo, faris grandan miraklon en la homa historio konkeri la plej altan montpinton de la mondo de ĝia norda deklivo, venkinte la miljaran glacieron kaj neĝon kaj apikajn krutaĵojn. Nelonge poste, naskiĝis la Tibeta Alpista Grupo kun membroj de la Ĉina Alpista Teamo kiel la kerno, kio malfermis la unuan paĝon de la moderna alpismo de Tibeto. Novembre de tiu jaro la 15-membra esplorgrupo organizita de la Tibeta Alpista Teamo esploris la montpinton Namjagbarwa ĉe la granda kurbiĝo de la rivero Jarlung Zangbo. De decembro, 1960 ĝis majo de la sekva jaro ili esploris la montpinton Ŝjiŝabangma kaj ĝian ĉirkaŭan regionon. Aŭtune de 1961 la alpista teamo mobilizis pli ol 100 personojn por alpisma ekzercado ĉe la montpinto Ŝjiŝabangma, kaj tiele ili faris pluan preparon por ĝin konkeri.

La montpinto Ŝjiŝabangma situas norde de la ĉefa firsto ĉe la meza parto de Himalajo, en la gubernio Njalam. Rigardate de la stepo kelkdek kilometrojn malproksima, Ŝjiŝabangma kiel giganta piramido majeste leviĝas inter la neĝkovritaj montpintoj de Himalajo. Ĝia montkresto kovrita de dika tavolo da neĝo superstaras la nubojn kaj la grizbruna danĝera rokmuro apike leviĝas al la ĉielo de la montvala abismo. La zigzagaj glaciriveroj formitaj el neĝamaso dum longaj jaroj kaj la gigantaj lavangoj formis obstaklojn malfacile konkerblajn por montgrimpistoj. La malfavoraj naturaj kondiĉoj faris Ŝjiŝabangma la unika pinto nekonkerita el la 14 montpintoj. La tibetanoj delonge nomas ĝin Ŝjiŝabangma, kie velkas sekalo kaj pereas la brutoj. Meze de la 20-a jarcento eksterlandaj alpis-

toj nomis ĝin Mistera Montpinto kaj opiniis, ke la lasta celo de la monda tegmento alvokas bravulojn.

De marto ĝis majo de 1964 tibetaj alpistoj aliĝis al la Ĉina Alpista Teamo kaj brave prenis sur sin la taskon konkeri la lastan obstaklon de la tero kaj je 20 minutoj post la 10-a de la 2-a de majo sukcese ascendis la montsupron de Ŝjiŝabangma. Inter la 10 sukcesintoj estis 6 tibetanoj.

Ankaŭ la 27-a de majo, 1975, estas tago memorinda en la alpisma historio de Tibeto. La Ĉina Alpista Teamo inkl. de Phanthog kaj aliaj 7 tibetanoj surgrimpis la montpinton Ĉomolangma de ĝia norda deklivo. Inter la 9 alpistoj estis nur unu hano, kiu estis veterana membro de la Tibeta Alpista Teamo. Phanthog, la unua tibeta virino, kiu surgrimpis la montpinton Ĉomolangma en la homa historio, estis honorita virino plej alte staranta en la mondo, kaj rigardata kiel heroino de la tibeta nacieco. Dum grimpadon aliaj 5 tibetaj alpistinoj atingis la altecon de 8 600 metroj.

La montpinto pli ol 7 000 m. super la marnivelo, kiun la Tibeta Alpista Teamo surgrimpis sola, estis Zŭoaŭjoŭ, la 6-a alta montpinto en la mondo. La 1-an de aprilo, 1985, la 46 membroj de la teamo eliris el Lhasa kaj komencis sian vojaĝon. Survoje al la celloko estis ĉarma seraka arbaro, vertikalaj glacifendegoj, surmontaj lagoj formitaj el degelintaj neĝo kaj glacio kaj ŝtonrulaĵoj. Sur la kelkmil-metraĵo glaciriveroj vidiĝis diversaj glacioblokoj en formoj de bulo, fungo kaj kolono. Ĉio ĉi tamen ne povis malhelpi la tibetajn alpistojn. Je 10 minutoj antaŭ la 6-a ptm



Grimpado sur glacia krutaĵo

de la 1-a de majo 9 tibetaj alpistoj sukcese atingis la montkreston de Zŭoaŭjoŭ. Jen malfermiĝis la nova paĝo de la tibeta alpismo! En la lastaj pli ol 20 jaroj 85 membroj el la Tibeta

Alpista Teamo 104-homfoje atingis la alton de pli ol 8 000 metroj kaj pli-ol-200-homfoje atingis la alton de pli ol 7 000 metroj.

Por kontentigi la deziron de



Kolektado de glaciaj specimenoj sur Ĉomolangma

eksterlandaj alpistoj kaj turistoj, oftigi la amikan kontakton inter la alpistoj ĉinaj kaj alilandaj kaj akceli la lokan modernan alpismon. Tibeto malfermis al la eksterlandanoj 21 montpintojn inkl. de Ĉomolangma. Tuj post kiam publikigis la unua informo pri la malfermo de 9 montpintoj, Tibeto fariĝis loko alloga al alpistoj kaj turistoj. Aro post aro da eksterlandaj alpistoj kaj turistoj sin direktis al Ĉomolangma kaj aliaj montoj. Pro siaj nekomparebla alteco, kaprica vetero, danĝeriga tereno kaj ĉarma pejzaĝo Ĉomolangma allogas al si sennombrajn alpistojn. Por multaj alpistoj atingi la kreston de

la monto de ĝia norda deklivo estas la plej granda gloro. Prin-tempe de 1980 tri membroj de la Japana Alpisma Societo atingis la montpinton de ĝia norda deklivo kaj per tio fariĝis la unua alilanda alpista grupo, kiu sukcesis en konkero de Ĉomolangma. Aŭtune de la sama jaro iu italo sukcesis surgrimpĉi Ĉomolangma de ĝia norda deklivo. Aŭtune de 1985 ses usonanoj ascendis la kreston de Ĉomolangma de la sama deklivo. Post unu jaro alia usonano kaj du aŭstralianoj sukcesis fari la samon. Estis interese, ke en la lasta tagdeko de aprilo, 1984 la usona, hispana kaj kanada alpistaj grupoj sam-

tempe ascendis al la ĉefa pinto de Ĉomolangma ĉe la alto de 7 000 metroj super la marnivelo laŭ tri malsamaj linioj.

La kuna montgrimpado de la alpistoj ĉinaj kaj alilandaj en Tibeto komenciĝis de Namunani-montpinto en 1985. La 26-an kaj 28-an de majo, 1985, en intima kunlaborado ĉinaj kaj japanaj alpistoj dufoje surgrimpis la montpinton 7 694 metrojn super la marnivelo en la gubernio Burang. Aprile de 1986 ĉinaj kaj japanaj alpistoj refoje kunlaboris. Ili organizis la Tibet-Naganaan alpistan grupon el po 17 japanoj kaj tibetanoj por grimpi la montpinton Ĝangzi, 7 543 metrojn super la marnivelo, norde de Ĉomolangma. Tio estis la unuafoja kunlaboro inter la tibetaj alpistoj kaj alilandaj kolegoj.

La moderna alpismo de Tibeto iagrade disvolviĝis, tio tamen estis nur komenco. Nun la koncernaj departementoj de Tibeto rapidigas esploradon pri la montpintoj kaj entreprenas sciencan esploradon pri la alpismo por doni necesajn materialojn al la eksterlandaj alpistoj kaj turistoj. Ili ankoraŭ rapidigas siajn paŝojn por fari lokajn kamparanojn kaj paŝtistojn helpantoj al alpismo, energie dresas gruntbovojn, "ŝipojn de la altebenaĵo". Ili faras ĉion ĉi por akceli la tibetan alpismon kaj kontentigi la bezonon de diverslandaj turistoj kaj alpistoj. Krome, ili planas disvolvi montan skiadon, glisadon kaj aliajn surmontajn sportojn.

"Tibeto Hieraŭ kaj Hodiaŭ" (en serio) jam finiĝis ĉinumere. Kun ĝojo ni atendas opiniojn de niaj legantoj pri tiu ĉi rubriko. Cetere, ĉiuj artikoloj aperintaj sub tiu ĉi rubriko estos kompilitaj en libron, kiu eldoniĝos post nelonge.

La Red.





La 27-an de majo 1975 naŭ ĉinaj alpistoj surgrimpis la pinton Comolangma.



Grimpado

Ĉinaj alpistoj marŝas en neĝkovrita montaro.







Ĉinaj alpistoj loĝas ĉe serako.

Ĉinaj kaj japanaj alpistoj marŝas al la pinto Ĝangzi.

Ĉinaj kaj japanaj alpistoj sur la pinto Ĝangzi






Marŝo apud serako sur la norda deklivo de Como-langma.

Ĉina estro (maldekstre) de la Ĉina-Japana Alpista Grupo kaj japana vicestro (meze) de la grupo en observado de irota vojo





Eskalado

Alta trančil-eskalo

EL REALA VIVO DE ĈINIO

Grimpado sur trančil-eskalo

Fotoj de ĈJU ŬEJBO

Printempe mi veturis de Tengĉong-gubernio. Junnan-provinco, norden laŭ zigzaga aŭtovojo en valo. Post ĉ. ses horoj mi aŭdis tamburadon kaj vidis multajn homojn proksime. Mia akompananto diris al mi, ke tie estas vilaĝo de lisu-oj kaj morgaŭ okazos la Tranĉil-
 eskala Festo. Kun scivolemo mi decidis resti por koni la moron de la lisu-oj. Frumatene de la sekva tago junaj kaj maljunaj lisu-oj kolektiĝis sur placo apud la vilaĝo. Inter ili estis okulfrapaj la virinoj en festaj vestoj. Mi venis tien kune kun homa fluo.

Sur la placo estis starigita eskalo kun alteco de 30 metroj. En la suno brilis ĉiuj ĝiaj ŝtupoj. La eskalo ne estis ordinara, ĉar ĝi konsistis el 36 akraj tranĉiloj. ĉiu kun longeco de 60 cm. kaj kun klingo supren.

Komenciĝis la grimpado. Mi vidis, ke iu nud-
 pieda lisu-o eksaltas, kaptas klingon permane kaj supreniras piedpremane unu ŝtupon post alia. Post momento alia nudpiedulo lin sekvis. La ĉeestantoj kun timemo ilin rigardis. La grimpantoj sukcesis atingi la supron kaj revenis malsupren senvundaj. Ili prezentado ricevis varman aplaŭdon de la rigardantoj. Ĝi montras la kuraĝon kaj obstinecon de la lisu-oj.



Por ĝui spektaklon

Parado de eskalo






Akrigo de klingo




Virinoj sin ornamas.



Por okupi bonan lokon sur la placo, infanoj frumatene hejtas fornon por sin varmigi tie.

Grimpado sur tranĉil-eskalo





La ĝenerala sekretario de KPC Hu Jaŭbang intervidiĝas kun membroj de la Rumana Junulara Delegacio.

Amika renkontiĝo de ĉinaj kaj rumanaj junuloj

La Rumana Junulara Delegacio al la kunveno por amika renkontiĝo





Haŭ Ĝjansŭ, membro de la sekretariato de la Centra Komitato de KPC, manpremas artistojn de la du landoj.

Gvidate de Nicu Ceausescu, la unua sekretario de la Centra Komitato de la Rumana Komunisma Junulara Ligo, la Rumana Junulara Delegacio el pli ol 150 membroj faris amikan renkontiĝon kun ĉinaj junuloj en Pekino, Hangĝou kaj Ŝanhajo kaj vizitis tie fabrikojn kaj historiajn restaĵojn de la 26-a de majo ĝis la 3-a de junio.

La aktivado havas apartan signifon en la Internacia Jaro de Paco. Kune kun la diverslandaj pacamaj junuloj la ĉinaj kaj rumanaj junuloj, alte tenante la torĉon de amikeco, batalas por la eterna paco de la mondo.



Rumanaj amikoj en Hangĝou

Laboristoj de la Pekina Dizelmotora Fabriko donacas silkan flagon al la rumanaj amikoj.

La rumana delegacio akceptas kaligrafiaĵon en la Geknaba Domo de Ŝanhajo.



Renkontiĝo de esperantistoj en Lepsiko

En la komenco de marto, ĉi-jare kiel membro de la libroekspona grupo de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio al la Lepsika Internacia Printempa Libro-Foiro, mi flugis al Lepsiko, GDR. Dum mia restado en Lepsiko mi ĉeestis la Internacian Foira-Esperantistan Renkontiĝon (IFER), invitive de ĝia Organiza Komitato. 252 esperantistoj el 12 landoj pasigis du tagojn en atmosfero de ĝojo kaj amikeco. Post la renkontiĝo mi vizitis esperantistojn en la urboj Karl Marks kaj Berlino.

SOLENA KAJ ĜOJA INAŬGURO

Vespere de la 14-a de marto, je la sepa kaj duono la "Renkontiĝo" inaŭguriĝis en akompano de solena muziko. Junpioniro la unua faris gratulan parolon. Poste en la nomo de la Organiza Komitato s-ino S. Schulze deklaris IFER malfermita. Prezidanto de Lepsiko-distrikto de Kulturligo de GDR s-ano Peter Heldt kaj aliaj gvidantoj de la kulturaj rondoj de Lepsiko ĉeestis la inaŭguron kaj faris parolon pri la rolo de Esperanto en la Kontraŭfaŝisma Milito, la klopodo de GDR por paco, progreso kaj aliaj. S-ano Hans Heinel,

prezidanto de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR en sia parolo varme bonvenigis la ĉeestantojn kaj deziris grandan sukceson al la "Renkontiĝo".

Donis parolon ankaŭ la reprezentantoj de Ĉinio, Aŭstrio, Bulgario, Belgio, Ĉeĥoslovakio, FR Germanio, Francio, Britio, Hungario k.a. Ĉiuj ĉeestantoj unuanime opiniis, ke tiu "Renkontiĝo" kun festa etoso certe faros apartan kontribuon al la amikeco inter la diverslandaj esperantistoj, mondpaco kaj homa progreso.

LEPSIKO — URBO DE LA LABORISTA ESP-MOVADO

Jen la temo de la IFER 86': Lepsiko — Urbo de la Laborista Esp-movado. Antaŭtagmeze de la 15-a de marto, s-ano Wollenberg Fritz faris paroladon kun la titolo "Ernst Thalmann estas inter ni". Li rakontis pri la biografio de Thalmann kaj montris, ke la aktivado de la Germana Laborista Esperanto-Asocio estas nedisigebla de la Komunista Partio de Germanio kaj ĝia gvidanto Thalmann, kaj ke la Esperanta Asocio en Kulturligo de GDR estas "realiganto" de la testamento de



Ĉinaj eldonaĵoj kaj metiartaĵoj eksponataj en la ĉina vespero

*Kantado en la
ĉina vespero*



Thalman kaj batalas kontraŭ faŝismo kaj promondpaco. S-ino Ino Kolbe faris prelegon sub la titolo "Lepsiko — Urbo de la Laborista Esp-movado". Ŝi kolektis materialojn el ĵurnaloj, gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj kaj eĉ de veteranaj esperantistoj kaj ordigis la materialojn pri la historio de la Esperanto-movado de Lepsiko en la periodo de 1910 ĝis la Dua Mondmilito. La riĉaj materialoj konvinke pruvis, ke Lepsiko vere meritas la nomon urbo de la laborista Esp-movado. Kvankam la Esperanto-movado de la urbo ne havas longan historion, tamen ĝia rolo ludita en la Kontraŭfaŝisma Milito kaj ĝia kontribuo al la monda Esperanto-movado plene montris, ke ĝi tute meritas la zorgadon kaj laŭdadon de la monda esperantistaro.

"DELONGE NI VIN ATENDIS"

La "Renkontiĝo" havis riĉan programon. Krom prelegoj IFER havis ankaŭ malgrandajn fakajn aktivadojn, kiaj fervojista kunveno, komputilista kunsido, raportista kaj redaktora kunsido, filatelista kunsido, literatura kurso Poezio en Esp., poemdeklamo, projekcio de lumbildoj, gitar-ludo, danc-prezento, pup-teatro kaj vizitado.

Pro tempomanko, mi ĉeestis nur kelkajn el ili. La Organiza Komitato aranĝis mian paroladon la 15-an, posttagmeze. Mi ne povis rifuzi la

afablecon kaj komplezan inviton. Sed pri kio mi parolu? Mi ne povis decidi. S-ano Joachim Schulze, membro de la Organiza Komitato kaj redaktoro de "Saksa kuriero", sugestis al mi, ke mi parolu pri la nuna stato de la Esperanto-movado en Ĉinio. Do mi faris mallongan paroladon pri la Esperanto-movado en Ĉinio. Multaj esperantistoj interesiĝis pri la preparo de la 71-a UK en Pekino kaj bombardis min per demandoj, kiujn mi respondis laŭeble. Post la kunveno iu esperantisto diris al mi: "Ni delonge atendis, ke ĉinaj esperantistoj gastu ĉe ni. Ni tre ĝojas, ke hodiaŭ ni ne nur vin vidis, sed ankaŭ informiĝis pri la ĉina Esperanto-movado." Min gratulis ankaŭ aliaj samideanoj kaj, kunpremante mian manon, diris: "La rapida disvolviĝo de la Esperanto-movado en Ĉinio estas granda kuraĝigo por ni." Iliaj varmaj vortoj kaj sincereco min rememorigis pri la vortoj de gesinjoroj Schulze: "Ĉu vi scias, kiamaniere ni sukcesis venigi vin? Jam en la Lepsika Internacia Printempa Libro-Foiro de 1985, ni vizitis la ĉinan standon, longe parolis kun la direktoro de via kompanio kaj petis, ke li sendu unu esperantiston al IFER 86'. Ni delonge atendis la ĉinan delegiton."

ĈE LA STANDOJ DE ĈINAJ ESPERANTAĴOJ

En la halo antaŭ la kunvenejo estis du standoj. Sur ili estis montrataj ĉinaj Esperantaĵoj,

kiujn ni donacis al la Lepsika Esperanto-Asocio. Ĉiutage multaj homoj kun intereso pririgardis la ĉinajn eksponaĵojn, demandis pri abonmaniero kaj petis katalogon. Tie mi renkontis fervorajn abonantojn de EPĈ, fidelajn aŭskultantojn de Radio Pekino. Ili laŭdis, ke EPĈ estas la plej bela Esperanta revuo kun riĉa enhavo, modela lingvo kaj fajna preso kaj, ke ĝi rimarkinde progresis. Ili esperis, ke la revuo ilin regule atingos. Aŭskultantoj de Radio Pekino diris, ke la Esperanta programo de Radio Pekino estas enhavoriĉa kaj ĝiaj laborantoj parolas klare. Kompreneble, oni ankaŭ esprimis siajn esperojn kaj donis proponojn al la redakcio de EPĈ kaj Radio Pekino. Kiel distribuanto de la ĉinaj Esperantaĵoj, mi ĝojas havi tiel multajn fervorajn legantojn kaj volontas fari pli bonan servon al niaj samideanoj.

La standoj, kvankam ne grandaj, fariĝis tamen ponto interliganta nin kaj diverslandajn esperantistojn, en kio mi vidis la signifon de mia laboro.

LA ĈINA VESPERO

La "Renkontiĝo" finiĝis la 16-an de marto.

Invitite de la Esperanto-Asocio de Karl-Marx-Stadt, mi akompanate de R. Burmeister vizitis la industrian urbon kun 315 000 loĝantoj, proksiman al Lepsiko, la 18-an de marto.

Dank' al la zorgema aranĝo de la gastigantoj, mi povis en duontago viziti la Muzeon de Karl Marks kaj omaĝi al la monumento de Karl Marks per flor-bukedo, kiun aĉetis speciale por mi R. Burmeister en Lepsiko.

Vespere, en la klubo Pablo Neruda oni okazigis "ĉinan vesperon", en kiu mi projekciis lumbildojn pri Pekino. La ĉeestantoj montris grandan intereson pri tio. Post projekciado ili faris multajn demandojn al mi. En la vespero oni ekspozis ankaŭ ĉinajn Esperantaĵojn kaj ĉinajn palac-lanternojn, silkajn homfigurojn, porcelanaĵojn, ĉin-stilajn pentraĵojn, kaligrafiaĵojn, kaj eĉ pandajn pupojn kaj gongojn. En alia lando mi sentis grandegan ĝojon, kiam mi vidis, ke la ĉinaj objektoj estas bone konservataj de germanaj amikoj.

TAGOJ EN BERLINO

Mia restado en Berlino estis nelonga kaj krome la tiea vetero kapricis, kio min ne favoris.

Sed malgraŭ ĉio ĉi, mi devis viziti nian malnovan peranton Karl Maier kaj lian edzinon. Antaŭ 20 jaroj, kiam mi ekokupiĝis pri distribuado de Esperantaj eldonaĵoj, mi jam sciigis pri la nomo de tiu veterana esperantisto.

Post klopodo ni fine trovis domegon apud la Berlina Sporthalo, kie loĝas ges-roj Maier. Enirinte la ĉambron, mi tuj vidis diversajn ĉinajn objektojn (sciu, ges-roj Maier loĝis en Ĉinio dudek jarojn!), kiaj brodita murtapiŝo, porcelanaĵoj kun blujaj desegnoj sur blanka fono, ĉin-stilaj mebloj, ĉin-stilaj pentraĵoj donacitaj de Li Keĵan, Gŭan Ljang kaj aliaj famaj ĉinaj pentristoj. Ĉio ĉi tio montris la profundan amikecon de la gemastroj al Ĉinio. La pli-ol-70-jara ges-roj Maier estis sanaj, viglaj kaj parolemaj. Ni interparolis ĉ. du horojn. Mi informiĝis, ke ili pretas viziti Ĉinion en konvena tempo.

En Berlino mi intervidiĝis kun s-ro Gerd Brahmer, Ligosekretario pri Internaciaj Aferoj de Kulturligo de GDR, kaj d-ro Detlev Blanke, kiu antaŭ nelonge revenis de Finnlando post sia disertado. Ni interŝanĝis opiniojn pri distribuado de Esperantaj eldonaĵoj.

"ESPERANTO ESTAS PRAKTIKA!"

Dum la foiro nemalmultaj esperantistoj venis al niaj standoj. Mi ne scipovas paroli germane. Tial, kiam esperantist(in)o venis al ni, mi petis, ke li aŭ ŝi estu mia interpretist(in)o. Behr, membro de la Organiza Komitato kaj prezidanto de la "Renkontiĝo", Sabine Schulze, vicprezidanto de la provinca E-Ligo de Lepsiko, kaj ŝia filo Ŝaŝa, R. Burmeister, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Karl-Marx-Stadt, kaj lia filo, venis al niaj standoj. Krome ankaŭ esperantistoj de Aŭstrio, FRG, GDR kaj aliaj landoj servis kiel provizoraj interpretistoj. La vizitantoj miris, ne sciante kian lingvon ni parolas. Iuj prenis ĝin por la itala, aliaj eĉ por la ĉina. Tiam niaj interpretistoj fiere montris al ili la verdan stelon sur sia brusto kaj sciigis ke ni parolas Esperante. Tio estis atentita de la vizitantoj. Iu virino diris: "Esperanto estas vere praktika!" Vere, Esperanto, kiel lingvo, ludas certan rolon en la internacia komunikado.

Mi revenis Pekinon kunportante profundan amikecon de alilandaj esperantistoj. Mi neniam forgesos ilian sincerecon kaj amikecon al la ĉina popolo. La belaj tagoj, kiujn mi pasigis en GDR, kuraĝigos min labori pli energie por Esperanto.

Ok sanigaj ekzercoj (v)

(Daŭrigo)

IV. Dentoklakigo

A. Dentoklakigo:

Antaŭ la ekzercado unue vin liberigu de ĉia ajn pensado kaj koncentri vian atenton. Poste delikate klakigu la dentojn supraĵn kaj malsupraĵn pli ol 30 fojojn.

La dentoj ne nur estas ekstremo de osto, sed ankaŭ havas striktan rilaton kun la stomako, intestoj, lieno, renoj, hepato kaj aliaj. La ofta dentoklakigo povas sanigi la dentojn kaj akceli la funkcion de la digesta sistemo.

B. Gargari la buŝon:

Fermu la buŝon kaj kunpremu la dentojn. Faru gargaron pli ol 30 fojojn per la parotidoj kaj lango. Ĉe la gargarado estiĝas pli da salivo. Kiam la buŝo pleniĝas de salivo, malrapide en-

glutu ĝin 3-foje. En la komenco eble produktiĝas malmulte da salivo, tamen ĝi pliiĝas post longa ekzercado.

La ekzercado estas utila al la funkcio de la eŭstakia tubo kaj larmodukto, povas skui la miringon kaj delikate eksciti la cerbon. Tiu ekzercado refreŝigas homon, plibonigas la aŭdadon kaj preventas orelzumadon.

La dentoklakigo estas utila al la sangocirkulado de la denta periosto, denta pulpo kaj gingivo, utilas al nutrado kaj fortigo de la dentoj, al prevento de kario kaj aliaj dentmalsanoj. Iu klakigis siajn dentojn po 200 fojoj ĉiumatene kaj ĉiuvespere, kio forigis lian dentan periostiton. Ofta farado de la suprediritaj ekzercoj evitigas maseteran kaj vangan atrofion. Krome,

tio evitigas ankaŭ la moviĝon kaj falon de la dentoj.

La salivo kun amilazo, baktericido, imunoglobulo A k.a. helpas digestadon, sterilizon kaj reziston kontraŭ viruso. La ekzercado povas purigi la buŝon kaj plifortigi la normalan funkcion de la buŝa mukozo en prevento de malsanoj.

Atentu:

a. Faru la dentoklakigon kaj gargaradon tuj post manĝo.

b. La dentoklakigo kaj gargarado de la buŝo povas esti farataj samtempe, sen limigo de fojoj.

c. Matene gargaru la buŝon per akvo, antaŭ ol fari la menciitajn ekzercojn.

(Daŭrigota)

**INTERNACIA ASOCIO DE
HANDIKAPITAJ
ESPERANTISTOJ (IAHE)**

eldonas specialigitan revuon:

**VOĈO DE
HANDIKAPULOJ**

La celo de tiu ĉi revuo estas aŭdigi voĉon kun fizikaj malavantaĝoj, ne por plendi, sed por esprimi kreivecon, optimismon, amon kaj homan fratecon kaj humanecon.

Redaktas: S-ro Duŝan Adnadj

Jarabono: 5.-US dol. aŭ egalvaloro en nacia valuto, pagebla al nia konto ĉe UEA sub kodo: Voch-o aŭ per internacia poŝtmandato al nia adreso: "Voĉo de Handikapuloj" 56227-Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio.

Kelkaj proponoj

Lasu min ekzempligi por mi ege ŝatatajn temojn: la noticoj pri eventoj sur la muzika, teatra, literatura kampoj, laŭ mi EPC povus pliampleksigi tiajn noticojn precipe kiam oni konsideras la plurmiljaran rolon de ĉina kulturo. La raportoj pri naturmedicino estas nuntempe ege grava afero ĉar ankaŭ en Eŭropo pli kaj pli multe da homoj rekonsciigas pri la grava rolo de naturmedikamentoj, do, la kontribuo de la Ĉina Popola Respubliko sur tiu kampo certe estas bonveninda de ni ĉiuj: grave ke EPC ofte raportas pri la novaj ekonomiaj reformoj. Tre simpatia faktoro estas la fakto ke oni en ĈPR ankaŭ aplikas sinkritikon i.a. pri la pasintaj eraroj, kiamaniere ĈPR sukcesis liberigi sin de sia blinda dogmo de neeraremo. Bonege ke ĈPR malfermas pli kaj pli siajn pordegojn al la ekstera mondo, sed samtempe mi esperas ke oni en ĈPR gardu sin kontraŭ influo de certa kulturgrupo.

Bertil Englund (FRG.)

Post kelktempa interrompo mi reabonis vian ŝatatan revuon "El Popola Ĉinio." Tre interesis min la paĝo "Por Via Sano": la artikoloj "Masaĝo de oreloj kaj okuloj" de s-ro Sun Ŭejljang kaj "Memmasaĝo" de s-ro Ŭang Joŭjen en la lasta numero.

1. Oni nepre klopodu facilkompreneble kaj detale skribi

kaj kun taŭgaj bildoj klarigi, ĉar nur ĝusta aplikado de la masaĝoj promesas efikon. (La bildoj kiuj koncernas la masaĝon de la oreloj kaj okuloj ne estas multe instruigaj.)

2. Multvalora por ĉiu esperantisto kiu interesiĝas por la saneco estus bona libro de masaĝo. Bonege estus, se la Ĉina Esperanto-Ligo kolektas ĉiujn artikolojn pri tiu temo kiuj aperis kaj aperos, kaj post refoja tralaboro eldonos ilin en libroformo. Kiel mi jam skribis, necesas facila skribmaniero, taŭgaj bildoj kaj nepre ĉapitreto en kiu la fakvortoj estas bone klarigitaj. Mi ekzemple havis penon kompreni ĉiujn fakvortojn en la artikolo de s-ro Ŭang Joŭjen "Memmasaĝo". En la Esp-vortaroj ili ne estas. Bone estus ankaŭ interkrampo skribi la elparolon de eventualaj ĉinaj vortoj.

Walter Kobelt (Svedio)

Mi estis instruisto, tial min plej interesis n-ro 6, en ĝi ja estis la prilernejaj eseoj. Laŭ mia opinio estas bone, ke vi ne imitis aliajn instrusistemojn kaj uzas memstraran ĉinan vojon.

Mi konstatas, ke multaj gelernantoj (ĉi tie kaj en aliaj lernejoj) ne atentis dum la leciono, tial ili malbone lernas. Ili sonĝas. Iliaj pensoj promenadis ie ĉe ludado aŭ ĉe aventura filmo ktp. Mankas la koncentrado, tamen

— ekzistas koncentrad-ekzercoj (de antikva Aristotelas) kaj en Hindio Jogo-lernejoj. Ĉi tie oni ne konsideras tion.

Se vi postulas "memlernadon", antaŭkondiĉo estas, ke la lernanto povas koncentri siajn pensojn. Tial mi petas, ke iam poste iuj instruistoj skribu pri tiu grava temo, eblas dum sekvonta jaro.

Ernst Diedrich (GDR)

Mi estas nova leganto de "El Popola Ĉinio". Mi trovis la gazeton tre interesa. Ofte mi voĉlegis la tekston por plibonigi mian prononcadon de la lingvo. Tamen, ĉu oni voĉlegis aŭ ne, mi plendas al vi pri la pres-problemo de vort-rompado inter du linioj. Ŝajnas al mi, ke la pres-redaktanto ne komprenas la signifon de la Esperantaj radikoj, ĉar multe okazas ke la vort-radikoj rompiĝis kiam oni povus facile rompi la vorton inter du radikoj. Ofte oni trovis eĉ du-literajn radikojn rompitaĵojn inter la du literoj.

Ĝenerale, kompare kun aliaj gazetoj, "El Popola Ĉinio" havas tro multajn vortorompaĵojn, ofte pli ol 20% de la linioj. Tio ne necesas. Mi petas ke vi transdonu mian plendon al la presisto de la gazeto kun la sekvaj punktoj:

(1) Malpliigu la nombron de la vort-rompaĵoj

Amikeco



Sinjoro Sato en Tokio telefonis al fraŭlino Li Ĝjunling en Pekino. Profitante la ŝancon, ĉiu el lia familio konkure interparolis kun ŝi, precipe liaj tri infanoj senĉese diris: "Saluton, onjo!" Kia estis la afero?

Sinjoro Sato laboris en la agentejo de iu japana kompanio en Ĉinio. Lia tuta familio kun kvin membroj loĝis unu jaron en hotelo de Pekino. Sato preskaŭ tuttage estis okupita de laboroj. Lia edzino Maziko faris mastromadon kaj zorgis pri siaj tri infanoj en la hotelo.

Ĉio en Ĉinio estis fremda al ili. Ili konis neniun ĉinon, nek la ĉinan lingvon. Ĉiutage ili devis manĝi en hotelo, kies manĝaĵoj ne vekis ilian apetiton. Foje Maziko mem preparis sim-

plan manĝon. Sed, kiam ŝi iris aĉeti legomojn, la infanoj faris grandan ĥaoson en la ĉambro. Informiĝinte, servistino Li Ĝjunling kaj ŝiaj kolegoj memvole helpis ŝin. Ili ofte aĉetis por ŝi kukumojn, tomatojn, kapsikojn, karotojn kaj aliajn freŝajn legomojn.

Japanaj infanoj, same kiel la ĉinaj, ŝatas alies manĝaĵon multe pli ol la sian. Li Ĝjunling kaj ŝiaj kolegoj tre amas infanojn. Kelkiam ili preparis multe da manĝaĵoj por la infanoj. En libertempo ili ludis kun la infanoj kaj instruis al ili kantojn. Krome, ili ankaŭ banis ilin kaj tondis al ili la harojn. Foje, la dua infano malsaniĝis, kaj ĝiaj vangoj ruĝiĝis de febro. Tion ne rimarkis la patrino. Sed la servistinoj tuj portis ĝin al ku-

raca servo, ĝin vizitis ĉiutage kaj preparis por ĝi varmajn vermicelojn.

Efektive kiu amas infanon, al tiu ĝi alkrociĝas. Kiam la servistinoj finis sian laboron, la infanoj ne lasis ilin hejmen reveni. Ofte ili enmanigis al ili bongustan manĝaĵon.

La familio de Sato devis reveni al Japanio. Nek la gastoj nek la servistinoj volis disiĝi. Ploris la infanoj kaj ankaŭ Li Ĝjunling kaj ŝiaj kolegoj. Ĉi tiuj ĉirkaŭprenis la infanojn kaj senfine ilin kisis.

Post la reveno al la hejmlando, la infanoj ĉiam memoras la onklojn en Pekino. La telefono, kiel amika ponto, denove ilin interligis.

(2) Kiam estas necese, ke vorto devos rompiĝi, bonvolu rompi ĝin inter la Esperantradikoj, ne meze.

David Broughton (Anglio)

Pri la leviĝanta terciara industrio de Ĉinio mi povas nur diri, ke mi deziras ke ĝi multe pli

plue disvolviĝu, por ke fine ĉiu ĉino havu la nemalfacilan vivon, kiun li (aŭ ŝi) meritas kiel civitano de bona lando. La artikolo "Ekonomiaj leĝoj. . . reformo" estas tre malfacila por mia kompreno. Kvankam mi komprenas ĉiun linion aparte, mi ne vidas la tutaĵon. Mankas al mi la scio

de la cirkonstancoj konkretaj. Ankaŭ "La progreso de ĉinlingva informa traktado" estas "cerbo-krakanta". Sed mi legos kaj relegos ĝis la aŭroro de tuta kompreno brilas antaŭ miaj okuloj.

J.M. van der Hoeven

(Nederlando)

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 25-j. teknikisto dez. kor. tutmonde pri komputilapliko, inĝenier-kibernetiko, lingvo ktp, kaj interesanĝi E-eldonaĵojn. Liu Haitao, Dian Jie Bu, Qinghai Lü Chang, Datong, Qinghai, Ĉinio.
- * Mi dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Adr.: Shi Yongning, Gongwai, Shida, Shijiazhuang, Ĉinio.
- * 27-j. kasisto dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Sun Fusheng, 3 hao, Shending Long, Shengzhen, Wujiang, Suzhou, Jiangsu, Ĉinio.
- * S-ro Xu Runjiu (23-j. lernejestro de elementa lernejo) dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj kun gesamideanoj de ĉiuj aĝoj kaj interesanĝas bk, esperantaĵojn. Certe respondos. Adr.: Cao Yingzhi

(Xu Runjiu), Lujiang Xian Erqing Gongsu Cangu, Anhui, Ĉinio.

- * 23-j. instruisto Sun Weiyun dez. kor. kun esperantistoj el la tuta mondo pri diversaj temoj angle aŭ esperante. Adr.: Diyi Zhongxue, Jiangchuan, Yunnan, Ĉinio.
- * Ding Shihui (24-j. mezlerneja instruisto de la angla lingvo) dez. kor. kun geamikoj de ĉiuj landoj pri arto kaj literaturo, interesanĝi librojn kaj gazetojn Esperantajn, anglajn kaj ĉinlingvajn, kaj kolektas pm kaj pk. Adr.: Di Qi Zhongxue, Changde, Hunan, Ĉinio.
- * Ŝatantoj de rock-muziko, ludante ĝin esperantlingve, registru kelkajn erojn, kaj sendu ilin al: RADIO FMR-ESPERANTO, Pascal DUBOURG, BP 86, F-76130 Mt St AIGNAN, Francio.
- * 13-j. finna knabo kolektas pm kaj pk, kiujn vi mem estas desegninta kaj subskribinta. Respondos certe same. Niko Bauer, 91910 Tupos, Finnlando.
- * Deziras korespondi el Pollando:
 1. 8-j. Kamilo Kwiatkowski, 15-143 Bialostoko, str. Putkowa 9m54.
 2. 16-j. Dorota Leszewicz, 15-j. Roberto Fraczek, 14-j. Ania Nosko kaj 14-j. Agata Prymaka, 16-030 Supraslo,

K/Bialystok, str. Kosciuszki 19.

- * 15-j. knabino volas korespondi tutmonde pri diversaj temoj, kolektas bk kaj glumarkojn. Adr.: Daria Mazurkiewicz, ul. Stoneczna 9, 63-400 Ostrow WLKP, Pollando.
- * 19-j. fraŭlo dez. kor. tutmonde pri muziko kaj diversaj temoj. Adr.: Maciek Mackowski, str. 1. AWP 77 loĝ. 50, 86-100 Swiecie N W, Pollando.
- * 15-j. Baroti Jldiko dez. kor. pri diversaj temoj kun amikoj ĉefe hungaraj, ĉeĥoslovakaj, jugoslavaj, sovetuniaj, rumanaj kaj bulgaraj. Adr.: str. Principala No 163, Loc Danesti cod 4127, Jud. Harqhita, R.S.Romania.
- * Oskar Walter, rentulo, dez. kor. kun ĉino pri ĉiuj temoj, pref. kulturo, arto, kutimoj. Kolektas bk. afr. filat. 88 Zittau, Albertstr. 14, F. 68/221, GDR.
- * 17-j. Agnieszka Maria Romaniak, dez. kor. kun ĉinaj amikinoj. Adr.: ul. Broniewskiego 24 m. 122, 01-771 Warszawa 86, Pollando.
- * 40-j. fervojisto dez. kor. pri ĉiuj temoj kun poloj el la urbo Tarnow. Adr.: Fiume Domenico, via Nazionale 80-Archì, 1-89050 Reggio Calabria, Italio.

Ebura drakŝipo

Teksto de ŜJU ĈIŜJAN

Foto de HU ĈUJ

La ebura drakŝipo kun longeco de 91.5 cm., larĝeco de 22.5 cm. kaj alteco de 58 cm. havas etaĝojn supran, mezan kaj mal-supran. Sur la ŝipo estas baldakenoj, drakflagoj kaj 42 diversaj homfiguroj, inkl. muzikistojn kun instrumento en la manoj. La artaĵo montras scenon el ĉina mito, kiu priskribas, kiel feoj festas naskiĝtagan datrevenon.

La drakŝipo estas delikate

skulptita, kun brilaj koloroj kaj bela aranĝo. La santala bazo en formo de ondoj donas impreson, ke la ŝipo veturas laŭ vento.

La artaĵo farita meze de la 19-a jarcento estis donaco de korteganoj al la imperiestra patrino Ciŝji de Ĉing-dinastio (1644-1911) por celebri ŝian naskiĝtagon kaj nun ĝi konserviĝas en la Imperiestra Palaco de Pekino.



Ebura drakšipo

815TV

